V-4252/77 (1984)

1984 januaro
77a jaro
n-ro 937 (1)
aperas monate (escepte de aŭgusto)


esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando










Elektitaj simbolo kaj afiŝo por la Centjara Jubileo



Dua konferenco de CED en Novjorko

Vi trovos

ĉi tiun numeron venanta al vi rapide post la antaŭa, kvankam ankoraŭ malrapide rilate la akcepteblan aperdaton. Se ni sukcesos fari ion similan pri la februara numero, vi komencos kredi, ke ni ja faras ĉion eblan por rekapti la aperritmon. El la teknika vidpunkto, vi rimarkos, ke ne plu necesas uzi lupeon por legi la rubrikon "Laste aperis...". Post tiom da jaroj ni decidis ne plu diskriminacii la librojn, des pli ke ili ankoraŭ konsistigas kvazaŭ la fundamentan ŝtonon de la Movado. La paĝojn 5 ĝis 7 okupas ampleksa raporto/recenzo pri projekto, kiu antaŭvidas gravan rolon de Esperanto en la aŭtomata tradukado. Ne hezitu legi tiun tekston eĉ se vi ne interesiĝas pri tradukado kaj aŭtomatoj, ĉar vi ja – supozeble – interesiĝas pri Esperanto. Aliajn gravajn tekstojn trovu mem. Jen ĉio por ĉi tiu fojo.

Enhavo

1. Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: Por kunlaboro de la tuta esperantistaro (Grégoire Maertens)
2. Estrarkunsido: Novaj homoj kaj labormetodoj; Premiitaj simbolo kaj afiŝo por la Centjara Jubileo
3. Centro de Esploro kaj Dokumentado: Dua konferenco en Novjorko
5. Lingvo-problemo: Esperanto kaj komputila tradukado (Bruce Arne Sherwood)
8. Faka agado: Verkistoj organiziĝas (Jiří Karen)
10. Letero el Brazilo: Tiuj, kiuj fosas esperante... (Victor Sadler)
12. Landa agado: Juneca sed multvorta kongreso (Emilija Lapenna); Lingvo: Kial ni diras "Usono"? (Bernard Golden)
13. Recenzoj: *Het Kinderras* de William Auld/W.A. Verloren van Themaat (Albert Goodheir); *Angla-Esperanta telekomunika vortaro* de Christian Bertin (Wouter F. Pilger); *Antologio de argentinaj noveloj* de Bastono de Kordobo (Boris Kolker); *Mikronoveloj de Sin'iti Hosi* de S. Hosi/Kikunobu Matuba (Kris Long)
16. Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
17. TEJO-paĝo: TEJO planas por 1984 (Graham Cansdale)
18. Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)

La kovrilo

La konferenco "Lingva konduto en internaciaj organizaĵoj", kiun meze de decembro okazigis CED pere de la Novjorka Oficejo de UEA, kunvenigis tutan aron da specialistoj, pri kio vidu la raporton sur la paĝoj 3 kaj 4. Ni provis meti iom da tiuj fakuloj ankaŭ sur nian kovrilon, kiun ni provas deĉifri por vi almenaŭ parte kaj jene: Supre maldekstre atentas Marie-Josée Jastrab, terminologia kunlaborantino ĉe la Fako de Konferencaj Servoj de UN. Supre dekstre videblas parto de la partoprenantoj en podia diskuto: Patricia Kenny, Angel Garciá, David de Ferrari kaj Guido Bertucci (li gvidis la diskuton), ĉiuj funkciuloj de diversaj fakoj de Unuiĝintaj Nacioj. Sube maldekstre parolas Jean-Claude Corbeil, sekretario de Internacia Konsilio pri Esploro kaj Studo de Fundamenta kaj Aplika Lingvistiko, en Montrealo (Kanado). Sube dekstre la Konferencon alparolas Françoise Cestac, direktorino pri tradukado en la fako de Konferencaj Servoj de UN en Novjorko.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL
I-4252/77 (1984)

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 937 (1), januari 1984. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Por kunlaboro de la tuta esperantistaro

La programestro de Radio Montrealo en Kanado kaptis informojn pri la ĉi-jara Universala Kongreso en Vankuvero kaj legis artikolon, kiu, sekve de mia intervjuo kun Associated Press en Bruselo, aperis en diversaj usonaj gazetoj. La sekretario de la programestro telefonis al mia brusela oficejo kaj proponis rektan elsendon de intervjuo. Mi petis antaŭmeton de la demandoj, kaj ni interkonsentis pri la dato de la revoko kaj intervjuo. La revoko okazis kun rezigno pri la intervjuo kaj pardonpeto pro la ĝeno.

Kio okazis? La programestro volis trakti la temon dum iu leĝera elsendo, ĉar li opiniis, ke temas pri malgranda grupo de idealistoj, kiuj pledas por artefarita internacia lingvo. Post la unua telefonvoko li informiĝis pri la vera situacio, ĝusta enhavo de la Esperanto-movado, kaj li konvinkiĝis, ke li devus trakti la temon pli altnivele. Nun mi kun intereso aŭskultis liajn argumentojn: tamen temas pri kelkaj milionoj da adeptoj; la Kongreso en Budapeŝto nombris pli ol 5 000 aliĝintojn; ekzistas oficejoj en multaj urboj...

Starante nun ĉiam pli proksime al la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo, ni plian fojon povus miri, ke gvida funkciulo de grava amaskomunika institucio unue nenion scias pri la grandeco de la Esperanto-movado, kaj post ricevo de informoj, komplete kaj rapide ŝanĝas sian opinion, kiu fariĝas favora por ni. Tamen, tia neinformiteco bedaŭrinde ne estas unika kazo.

Pro la fakto, ke la fenomeno de la Internacia Lingvo jam delonge, laŭ ni, apartenas al la kultura heredaĵo de la homaro, ni ofte — kaj prave — riproĉas la mankon de ĉi-rilata informiteco ĉe tiaj personoj. Aliflanke, ni el ĉi tiu kaj similaj kazoj devas konkludi, ke nia laboro sur la kampo de la informado daŭre restas nesufiĉa.

La grandeco de la skalo de tiu problemo provokas de tempo al tempo iaspecan frustracion ĉe kelkaj, kiuj erare konkludas, ke la Esperanto-komunumo, tia kia ĝi jam nun funkcias, sufiĉas por si mem. Ni konstatas el gazetartikoloj, rezolucioj, reagoj kaj protestoj, ke tia sinteno ne estas malofta en la Movado. Ĝi aperas sub la formo de plendoj pri la malfermiteco de niaj kongresoj, pri la ekspansio de niaj oficejoj kaj centroj; ĝi estas sentebla en gazetoj kaj ĉe eldonejoj, kiam ni verkas kaj eldonas por nia propra fermita rondo, kiam ni provas konvinki la konvinkitojn.

Alia aspekto de tiu frustracio ĉe kelkaj parolantoj de la Internacia Lingvo manifestiĝas en la formo de kverelemo pri internaj movadaj demandoj. Oni atakas la propran komunumon kaj fordibocas amason da energio, tiel bezonata por la informado al la vasta publiko, kiu jam estas preta aŭskulti nin. Tiajn atakojn oni daŭre direktas ankaŭ al UEA mem kaj ĝia politiko de aktiva senpartieco, sed ankaŭ al aliaj movadaj instancoj, kiuj uzas adekvatajn rimedojn por altiri la eksteran publikon al niaj plej grandaj publikaj manifestacioj. Tiaj kritikantoj pravus, se prave estus fermiĝi en intiman grupon aŭ asocion kaj ĝui la provizorajn fruktojn de la ĝisnuna agado. Male tamen estas, ĉar anstataŭ timi de la ekstera publiko, ni devus pretiĝi por vera inundo de la ekstermovadaj amasoj, kiuj praktike povus forgluti la ekzistantan Esperanto-movadon.

Multo en la vivo de Universala Esperanto-Asocio dum pluraj lastaj jaroj havis la celon pretigi la Asocion por tia defio kaj inundo de la ekstera publiko. Ni provas laŭiri la solan praktike eblan vojon por la atingo de la vera tutmondiĝo de la Esperanto-movado kaj de la Internacia Lingvo. Ni kun ĝojo povas konstati, ke UEA ĉi-rilate ĝuas la subtenon de la plimulto de ĉiuj gravaj instancoj de la Esperanta komunumo. Tion grandparte ebligas ankaŭ la organiza strukturo de la Asocio, kiu por sia kunordiga rolo bezonas senperan kontakton kun ĉiuj tavoloj de la socio kaj kun reprezentantoj de ĉiuj politikaj strukturoj. La 75-jara historio de la Asocio instruas al ni kaj al ĉiuj aliaj, ke estas maleble trudi al UEA partiecajn starpunktojn de kia ajn politika koloro, kaj ke oni kun kaj en UEA povas kunlabori nur se oni respektas ĝiajn bazajn principojn kaj celojn. Ĉio ĉi tamen ne signifas, ke ni ne reekzamenas daŭre niajn strategion kaj prioritatojn.

Ni nun staras ĉe la komenco de la trijara periodo, kiu kondukos nin ĉiujn al la Jubilea Jaro 1987. UEA eniras tiun periodon kun novaj Estraro kaj Komitato, kun ambiciaj sed realismaj planoj, por kies realigo la Asocio bezonas la kunlaboron kaj apogon de la tuta esperantistaro. Nur se ni tiel konceptas la preparojn por la centjariĝo de Esperanto, ni atingos la Jubileon pretaj kaj pli fortaj por plua progresigo de la Internacia Lingvo.

Grégoire Maertens

Novaj homoj kaj labormetodoj

La Statuto kaj la Ĝenerala Regularo de UEA preskribas amason da specifaj taskoj por la Estraro de la Asocio. La samon faras ankaŭ fasko da aliaj regularoj kaj gviddokumentoj, kiuj antaŭvidas, ke la Estraro decidu pli-malpli pri ĉio, de la aĉeto de brokanta skribotablo ĝis la demando, ĉu la kongresan bankedan menuon enestu laktuko aŭ tomata salato. Krome, la katalogon de la estraraj taskoj konsistigas ĉiaspecaj demandoj, de la financaj kaj movadpolitikaj ĝis la teknikaj kaj beletraj. Pro la fakto, ke la Estraro ne kunvenas ĉiusemajne sed nur du- aŭ trifoje jare, la estraraj kunsidoj ofte konsumiĝas per la plenumo de cento da teknikaj decidoj, tiel ke apenaŭ restas tempo funde trakti la pli gravajn, pli esencajn movadajn temojn.


Kompreneble, la sola efika solvo de tiuj problemoj estus havi plurajn estrarojn, kio siavice fariĝus neeltenebla almenaŭ finance. Efika funkciigo de komisionoj povus multon kontribui ĉi-rilate, kiel jam de pluraj jaroj okazas sur la financa kampo. Tamen, serĉi novajn vojojn kaj eblecojn ĉiam eblas. Tiel agis la Estraro en sia kunsido, kiu okazis de la 17a ĝis la 19a de decembro 1983 en Roterdamo.

Novaĵo en la estrarkunsida laboro estis dividiĝo en du grupojn, kies tasko estis pli funde konsideri unuopajn demandojn de la sama aŭ parenca labortereno, por poste reveni al la plenkunsido kun konkretaj proponoj. Unuafoje aplikita, tiu sistemo ne funkciis perfekte, sed ĝi montriĝis pluesplorenda labormaniero. Krome, tiaj eksperimentoj bonvenas ĝuste nun, kiam ekfunkciis la nova Estraro elektita en Budapeŝto.

Kiel antaŭvidite, la jaro 1983 portis malekvilibron en la spezoj de la Asocio. Kvankam la kontoj ankoraŭ ne saldiĝis definitive, ne estas malfacile prognozi, ke la jaro finiĝos per negativa saldo. Tion antaŭvidis la antaŭa Estraro kaj Komitato, pro kio altiĝis la kotizoj por la jaro 1984. Tamen, la kapitalaj kontoj de la Asocio fartas bone kaj oni do ne devas timi pri la financa sano de UEA. La anoncita domrekonstruo (Centra Oficejo) en Roterdamo definitive okazos dum 1984, ĉar intertempe konkretiĝis ankaŭ la necesaj administraj permesoj de la urbo. La Estraro decidis subvencii Fondaĵon Canuto (el Propaganda Konto) per ekstra sumo, por ankaŭ ĉi-jare ebligi membriĝon al irananoj, kiuj ankoraŭ frontas transpagajn problemojn. Ŝanĝiĝis ankaŭ aliaj reguloj pri la Fondaĵo, tiel ke ĝi ĉi-jare povos akcepti multe pli da membroj ol antaŭe. Aldone al *Nova Esperanta krestomatio*, kiun ellaboris W. Auld kaj kiu aperos plej verŝajne en 1985, la estraro decidis, ke UEA reeldonu ankaŭ la klasikan *Fundamenta krestomatio*, kiu intertempe denove elĉerpiĝis.

Premiitaj simbolo kaj afiŝo

En sia decembra kunsido, la Estraro de UEA decidis fermi la konkurson pri la jubileaj simbolo kaj afiŝo kaj premii la verkojn de **Hilmar Ilton S. Ferreira** el Itabuna en Brazilo (por la simbolo) kaj la duopon **Gyurkovics/Sekelj** el Subotica en Jugoslavio (por la afiŝo). La estraro konstatis, ke la reago al la konkurso estis multnombra kaj tre internacia, ĉar partoprenis multaj dekoj da kandidatoj el ĉiuj partoj de la mondo. Restas tamen por substreki, ke granda plimulto de la konkursaĵoj – en ambaŭ kategorioj – montriĝis esti netaŭga, ĉu pro idea banaleco, ĉu pro teknika primitiveco. La konkurso bele ilustras la malbelan fakton, ke la informado pri Esperanto restas malmoderna kaj tial neefika. Ĉu necesas diri, ke amaso da konkursaĵoj volis plekti en sian projekton ĉion de Zamenhof kaj la verda stelo ĝis mondmapo, Babelturo kaj barokaj pontoj? Pluraj el la konkursintoj ne komprenis, ke la simpleco estas grava konsista parto de la belo, ke tradiciaj movadaj simboloj portas nenian mesaĝon al la nemovada publiko, kiun la konkurso celis, kaj kiun unuavice devas celi nia tuta agado okaze de la Centjara Jubileo.



Elektante la du menciitajn verkojn la Estraro konstatis, ke ili ambaŭ bezonas finpoluron kaj kompletigon kaj tial ne meritas la plenan sumon (po mil guldenoj) de la anoncitaj premioj. La Estraro ne volas "ŝpari" parton de la premia mono, sed ĝi intencas uzi ĝin por subvencii plibonigon de kelkaj aliaj projektoj, tiel ke ni havu ja unu simbolon sed, se eble, plurajn afiŝojn por la Jubileo.


La Estraro decidis, ke la premiitaj verkoj kiel eble plej baldaŭ kaj plej vaste diskoniĝu, tiel ke oni ekuzu ilin tra la Movado. Tre baldaŭ UEA mem presos la premiitajn verkojn en plej diversaj formatoj, por kiel eble plej multflanka utiligo.

Dua konferenco en Novjorko

Jam la duan fojon la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo okazigis konferencon en Novjorko. Ĉi-foje la konferenca temo estis "Lingva konduto en internaciaj organizaĵoj".

"Priskriboj de la lingva situacio en la diversaj internaciaj organizaĵoj", asertis la antaŭanonco pri la konferenco, "kutime komenciĝas per, kaj ofte ne iras preter la oficiala lingva politiko en la koncerna organizaĵo. Sed oficiala lingva politiko malofte, se iam ajn, ĝuste respegulas la efektivan ĉiutagan lingvan interagadon en la organizaĵo." La celo de la konferenco estis "ekzameni neoficialan lingvan politikon", difini la metodikajn problemojn en tiaj esploroj kaj fiksi estontajn prioritatojn.

Kvindek specialistoj el Unuiĝintaj Nacioj, misioj de ŝtatoj-membroj de UN, neregistaraj organizaĵoj kaj universitatoj partoprenis la unutagan konferencon, kiun prezidis s-ino Françoise Cestac, estro de la Traduka Servo de UN.



Prof. Jonathan Pool (maldekstre) kaj Alexander Lehrman aktive rolis en la Konferenco.

Dum la matena sesio, la partoprenantoj aŭdis tri referaĵojn, pri la aplikiĝo de lingva politiko en UN (de Marie-Josée Jastrab, terminologo ĉe UN), pri lingvaj demandoj en multnaciaj firmaoj (Selma Sonntag, Universitato de Vaŝintonio) kaj pri lingvaj problemoj en multnaciaj militaj unuoj (Kurt Müller,



La dua novjorka Konferenco de CED arigis plurajn dekojn da fakuloj el diversaj lingvaj servoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj el pluraj usonaj universitatoj.

Amerika Asocio pri Modernaj Lingvoj). Komentis Alexander Lehrman (Universitato Yale).

La posttagmeza sesio donis apartan atenton al la lingvo kaj evoluigo (Jean-Claude Corbeil, Internacia Centro pri Fundamenta kaj Aplika Lingvistiko, Montrealo), la monda situacio de la hispana lingvo (Juan Gerona, Traduka Servo de UN) kaj interŝanĝo de tradukistoj (Charles Dadoun, Kanada Juda Kongreso). Tiun sesion komentis Jonathan Pool (Universitato de Vaŝintonio, estrarano de CED).

La programon kompletigis podia diskuto pri praktikaj spertoj de lingva uzo en internaciaj organizaĵoj, kun partopreno de pluraj UN-stabanoj sub gvido de Guido Bertucci (Fako pri Administrado, UN). Konkludajn rimarkojn kontribuis Humphrey Tonkin (Ŝtata Universitato de Novjorko, Potsdam, gvidanto de CED).

La pasintjara konferenco pritraktis la temon "Monda Komunika Jaro kaj lingvolernado". Samkiel la dua konferenco, ĝi okazis la 15an de decembro, kaj tuj sekvis ĝin akcepto de UEA okaze de Zamenhof-Tago. Multaj konferencanoj ankaŭ ĉi-jare venis al la akcepto, kiun partoprenis pluraj diplomatoj kaj UN-funkciuloj, inter ili la ambasadoro de FR Germanio ĉe UN, s-ro Günther van Well (antaŭa vicministro pri eksteraj rilatoj), kiu en aparta parolado invitis ĉiujn partoprenantojn al la Universala Kongreso de Esperanto en Aŭgsburgo en 1985.


Tiu ĉi konferenco en Novjorko reprezentas signifan antaŭenpaŝon por CED, kiu nun havas proksimajn kontaktojn kaj kunlaboron kun la lingvaj servoj de UN. Tria konferenco estas nun planata por la sama dato en 1984.

Anglalingva raporto pri la unua konferenco kun tekstoj de ĉefaj paroladoj estas havebla de UEA en Novjorko aŭ Roterdamo kontraŭ 22,50 nederlandaj guldenoj aŭ 7,50 usonaj dolaroj. La raporto ampleksas 100 paĝojn.



D-ro H. Tonkin, direktoro de CED kaj vicprezidanto de UEA, dum la Zamenhofa Festo en Novjorko. Meze estas d-ro J. Lieberman el Vaŝintono.





Selma K. Sonntag de la Universitato de Vaŝintonio (maldekstre) kaj Kurt E. Müller de Modernlingva Asocio de Usono referis en la Konferenco.

SALUTVORTOJ DE AMBASADORO VAN WELL

Pro tio, ke Unuiĝintaj Nacioj kaj Universala Esperanto-Asocio havas kiel komunan fundamentan celon la antaŭenigon de internaciaj paco kaj kompreniĝo, estas agrable noti, ke la Asocio kunlaboras kun la monda organizaĵo.

Kun granda plezuro ni eksciis pri la elektiĝo de Aŭgsburgo, en Federacia Respubliko Germanio, kiel gastiganta urbo de la Universala Kongreso de Esperanto en 1985, kiun ĉeestos eventuale 3 000 homoj el ĉiuj mondopartoj. En tiu jaro Aŭgsburgo ankaŭ festos la dumilan jaron de sia historio. Mi tial deziras al la Kongreso kaj ĝiaj organizantoj ĉian sukceson.

La mondo, kaj sekve Unuiĝintaj Nacioj, frontas la problemon de la multeco de lingvoj. Kvankam estas avantaĝe, ke multaj lingvoj esprimas kaj eligas la multajn malsamajn naciajn kulturojn kaj tradiciojn kaj faras ilin temoj kaj periloj de homa komunikado, estas malavantaĝe, ke ne ĉiuj personoj reciproke interkompreniĝas.

La valoro de monda lingvo estas do evidenta – sendepende ĉu temas pri la franca, la klasika diplomatia lingvo, aŭ la angla, hodiaŭ vaste uzata, aŭ la neŭtrala Esperanto. Ĉi tie en Unuiĝintaj Nacioj ni aparte konscias pri tio, ĉar interkompreniĝo inter ĉiuj nacioj estas nia ĉefa celo.

Je tiu ĉi festa okazo mi do transdonas niajn plej korajn bondezirojn al Universala Esperanto-Asocio por ĝia plua laboro je servado de paco kaj kompreniĝo inter la popoloj de ĉiuj landoj.

Esperanto kaj komputila tradukado

Nia revuo unuafoje skribis pri la projekto, kiun traktas la sekva teksto, en la numero de decembro 1982. Tiutempe temis grandparte pri ideoj ankoraŭ ne formulitaj skribe. Kiam en oktobro 1983 aperis ampleksa raporto pri la projekto, ni petis akademianon Sherwood (vicdirektoro de Esplor-Laboratorio pri Perkomputila Instruado, ĉe la Universitato de Illinois en Urbana-Champaign, Usono, kie li ankaŭ profesoras pri fiziko kaj lingvistiko) prezenti al niaj legantoj la tutan projekton, pli ol la raporton (libron) mem. Sherwood dediĉas – laŭ nia peto – apartan atenton al la "modifoj" de Esperanto, kiujn la projekto antaŭvidas. Estus utile, se oni al tiuj modifoj rigardus ne kiel al propono reformi Esperanton sed kiel al klopodo adapti ĝin por speciala uzo, kion oni cetere faras ankaŭ pri multaj lingvoj por la plej diversaj teknikaj kaj aliaj celoj.

Eŭropa Komisiono – la gvida instanco de Eŭropa Komunumo (EK) – konstatis, ke diversaj elektronikaj informo-servoj baldaŭ eniros hejmojn. Tiaj "teletekstaj" kaj similaj servoj necese haveblu en ĉiuj lingvoj de EK. Estus multekoste krei, stoki kaj revizii multlingvajn versiojn de la informoj. Pro tio la Komisiono financis projekton ĉe BSO, nederlanda sistemprogramada firmao, kun la celo esplori, ĉu eblus stoki kaj transsendi informojn en unu sola lingvo. En la hejmo komputila ricevilo tradukus en iun ajn lingvon, laŭ elekto. (Temas pri simplaj informoj, ne pri literaturaj tekstoj.) Krom la pure lingvaj celoj, la Komisiono deziras kuraĝigi evoluigon de altnivela teknologio en Eŭropo, por defii la pli progresintajn de Usono kaj Japanio.

Ĉar la traduko el la stoko-lingvo en la celo-lingvon ne estus farata en centra komputilego, sed en komputilo en la hejmo, BSO nomas tian sistemon "Distribuita Lingvo-Tradukado" (DLT). Ĵus aperis la fina raporto: *Distributed Language Translation** de A.P.M. (Toon) Witkam (1983, BSO, Utrecht). La raporto montras, ke tia sistemo jes povus esti konstruita, kaj ĝi proponas etapan, konkretan realigadon de la koncepto. Kio estu la nura stoko-lingvo, el kiu tradukiĝu ĉiuj aliaj lingvoj? Modifita Esperanto!

Parolantoj de Esperanto ĝojos ekscii, ke ilia lingvo povus roli en okulfrape altnivela teknologio. Tamen ili ankaŭ eble plendos pri modifoj de sia lingvo. Tuja klarigo necesas: la modifitan Esperanton ne vidus la publiko. La intenco estas, ke sole programistoj, lingvistoj kaj aliaj sistemistoj vidus tiun lingvaĵon, ĉar ĝi restus pure interna laborilo ene de la DLT-sistemo. De ekstere oni vidus diverslingvajn tradukojn el la modifita Esperanto, eble eĉ inkluzive de normala Esperanto.

Kial modifi? Kial ne uzi normalan Esperanton? Ofte nefakuloj asertas, ke la uzo de Esperanto kiel interlingvo en perkomputila tradukado ege utilus. Mi mem ĉiam estis tre skeptika, opiniante ke homa Esperanto estas tro dubsenca, por ke stulta komputilo povu kompreni ĝin, pro manko ĉe la maŝino de sufiĉa kunteksta kono pri la mondo. Mi foje skribis, ke oni devus multe labori, por krei sufiĉe ne-dubsencan modifitan Esperanton, kaj ke principe oni povus krei taŭgan modifitan lingvaĵon surbaze de iu ajn nacia lingvo. Oni ankaŭ povus uzi abstraktan arbostrukturon anstataŭ homan lingvon por esprimi sintakson kaj signifon.

Mi pravis kaj malpravis. Witkam detale pruvas, ke *homa* Esperanto ne estas *aŭtomate* traktebla de komputilo. Ekzemple, homo komprenas, ke en la frazo "gravedaj virinoj kaj infanoj" sole la virinoj kaj ne la infanoj estas gravedaj. Sen tiu kono de la mondo, ke



Titolpaĝo de la raporto de Witkam pri Distribuita Lingvo-Tradukado

---

*** Distributed Language Translation. Feasibility Study of a Multilingual Facility for Videotex Information Networks,** A.P.M. Witkam. Utrecht: Buro voor Systeemontwikkeling, 1983. 370p. Ilus. 30cm. ISBN 90 70730 01 4. Speciala prezo por la Esperanto-movado: 57,50 gld. (normala librovendeja prezo: 127,50 gld.). Sen rabato por revendistoj. Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

infanoj ne povas esti gravedaj, iam komputilo tradukis el la angla en la francan kun la rezulto "virinoj kaj infanoj gravedaj" (pro la necesa transloko de la adjektivo). Witkam sugestas, ke post kelkdek jaroj eble tradukoprogramoj kun artefarita intelekto konkeros tiajn dub-sencaĵojn, sed nuntempe oni devas utiligi pli precizan formon eĉ de Esperanto por ebligi rapidan kaj ĝustan *aŭtomatan* tradukon el tiu modifita Esperanto en aliajn lingvojn.

Witkam ne nur faras tre interesan katalogon de tiaj aspektoj de Esperanto. Li ankaŭ proponas detalajn modifojn por sia celo. Kiam mi supozis, ke neniu farus la grandan laboron necesan por konstrui nedubsencan Esperanton, mi ne povis imagi, ke iu dum tri jaroj serioze antaŭplanus tian projekton kaj poste akirus de ŝtata instanco la financojn, por profesie finesplori la ideon. La studo por Eŭropa Komisiono daŭris unu jaron, en kiu BSO uzis du homjarojn kaj enplektis ankaŭ konsilojn de elstaraj lingvistoj, komputistoj kaj esperantistoj. En la enkonduko Witkam dankas, inter aliaj, Heinz-Dieter Maas, monde konatan pro sia tradukosistemo SUSY, kaj akademianojn Victor Sadler, John Wells kaj Ivo Lapenna.

Witkam citas el artikolo de N.D. Andreyev (1967, en *Machine Translation*, red. A.D. Booth, North-Holland Publishing Co., Amsterdamo) por argumentoj kontraŭ la uzo de modifita nacia lingvo – nome pro eĉ pli grandaj problemoj ol tiuj montrataj de Witkam en homa Esperanto. Esperanto ja havas avantaĝojn: la gramatikaj finaĵoj ebligas rapidan analizon de sintakso, kaj la radikoj kutime havas nemultajn signifojn kompare kun nacilingvaj radikoj. Tamen eĉ Esperanton oni devas modifi por komputila trakto, kaj proksimume 20% de la modifita Esperanto diferencas de homa Esperanto. Verŝajne taŭge modifita nacia lingvo multe pli diferencus de la homa versio kaj do malfacile kreiĝus. Homa Esperanto provizas bonan bazon por komputile traktebla lingvo, kvankam ĝi ne povas uziĝi senpere.

Witkam kontraŭas la uzon de ia abstrakta arbostrukturo por esprimi la tradukendaĵojn. Li klarigas, ke sistemistoj ofte devas enrigardi kaj kontroli la agadon de la tradukosistemo. Estas granda faciligo, se la interna "kodo" estas home legebla lingvo, kia modifita Esperanto (kiu aspektas *preskaŭ* identa al homa Esperanto). Male, tute abstrakta reprezento malfaciligus kontrolon dum konstruo kaj posta flego de la sistemo. Krome, kaj grave, la modifita Esperanto en la kerno de la sistemo ankrus kaj kunligus la pezajn laborojn de la diversaj grupoj, kiuj devas ellabori kaj flegi leksikonojn por la diversaj lingvoj. Ĝi donus komunan lingvon (eble en du sencoj!) por esprimi teknikajn rilatojn.

Leksikono por traduki inter modifita Esperanto kaj alia lingvo ne estas simpla afero. Ne sufiĉas listigi vortajn ekvivalentojn. Ekzemple, ĉiu verbo (ankaŭ Esperantaj verboj) devas kunhavi detalajn informojn, ĉu ĝi estas transitiva, ĉu ĝi povas havi nerektan objekton ktp. Ĉi tia informaro plej ofte ne troveblas en kutimaj vortaroj, kaj oni devas utiligi multe pli ampleksajn priskribojn, kiel en *Plena analiza gramatiko*. Pro tio, ke en DLT multo el la interna strukturo kaj funkciado estas unulingva, povos esti nemalgranda ŝparo de raraj homfortoj rilate al kreo de leksikonoj.

Hodiaŭaj komputilaj tradukosistemoj ne funkcias tute aŭtomate sed helpas homan tradukiston tralabori multe pli da teksto en horo ol eblas sen tia sistemo. Homo ĉiam devas kontroli kaj korekti, konante kaj la fontan kaj la celan lingvon. DLT tamen uzeblus de unulingvuloj. Pro la precizeco de modifita Esperanto, aŭtomata traduko eblas en naciajn lingvojn. Sed ankaŭ la enigon de informo povos fari unulingvulo. Jen genia ideo de Witkam: Iu tajpus angle, kaj DLT provus traduki en modifitan Esperanton. Komprenble estus dubsencaĵoj. Ekzemple, DLT ne scius, ĉu *saw* signifas "vidis" aŭ "segas". Tiuokaze DLT enketas *anglalingve* sur la ekrano, kiu el la du signifoj validas. La tajpisto simple elektas inter la du (plejeble tajpante 1 aŭ 2, aŭ tuŝante la ekranon). Per tia nacilingva dialogo DLT konstruas precizan tradukon en modifitan Esperanton. Poste okazas "puriga" fazo, ia prov-traduko, por certigi, ke la traduko ne povos kaŭzi problemojn por la postaj el-Esperantaj algoritmoj, kiuj devas funkcii tre rapide kaj ne povas akiri multan kontrolon pri bonordo. Fine oni estas certa, ke la informo estas stokita en tute taŭga kaj ne-dubsenca formo por posta uzo.

La usona firmao Caterpillar, fabrikanto de grandaj konstrumaŝinoj, kreis "Caterpillar Fundamental English" (fundamenta angla), laŭ kiu estas verkataj manlibroj por priservo de Caterpillar-produktoj eksterlande, fare de teknikistoj, kiuj lernas legi nur ĉi tiun simpligitan formon de la angla. Kiel en "Basic English" (baza angla), estas nur 800 bazaj vortoj (kun suplementa ilustrita libro por la multaj mekanikaj teknikaj terminoj ekster tiuj 800 komunikaj vortoj). Ĉiuj vortoj estas strikte unusencaj. Krome, oni uzas nur tre simplajn frazojn kaj evitas adjektivojn kaj adverbojn. Alia firmao, Smart Communications, akiris la rajton pluvendi la sistemon. Smart nun ankaŭ havas komputilajn programojn, kiuj povas traduki el la simpligita angla en latinidajn lingvojn kaj en la germanan. (Por tio necesis aldoni pliajn 400 bazajn vortojn, precipe verbojn.) Do ĉi tiu projekto iom similas al DLT, sed la celaro verŝajne estas multe pli modesta ol tiu de DLT, laŭ la riĉeco de tekstoj.

Ne estas spaco ĉi tie por detala diskuto pri la modifoj de Esperanto por DLT. Estus tre konvene, se la Akademio kreus komisionon (ne nur akademianoj), por funde studi ĉi tiun gravan projekton. Iuj el la konstatoj de Witkam povus sane influi la evoluon eĉ

de homa Esperanto. Ekzemple, li uzas "antaŭ ke" kaj "post ke" anstataŭ "antaŭ ol" aŭ "post kiam", por paraleli "por ke", "sen ke" ktp. Eble ĉi tiu senesceptigo estus utila modifo de niaj kutimoj. Aliaj modifoj estus senutilaj por homa Esperanto (ekzemple, lia genia solvo pri la gravedaj virinoj kaj infanoj). Tria klaso de proponitaj modifoj ŝajne meritas pli vastan diskuton, ĉar eble ekzistus alia solvo, pli konforma al homa Esperanto. Ekzemple, Witkam atentigas pri la duba senco en "la manĝado de la muso". Ĉu la muso manĝatas aŭ manĝadas? Li proponas skribi "la manĝado de la muson", kontraste al "la manĝado far la muso". Ĉe prelego de Witkam en Budapeŝto (simpozio de la Societo Johano Neumann, aŭgusto 1983), la aŭskultantoj esprimis preferon por enkonduko de nova prepozicio anstataŭ uzo de akuzativo post "de" (do ekzemple "la manĝado den la muso" signifus, ke oni manĝis la muson). Plurloke Witkam elektas apogi sin sur proponoj troveblaj en *PIV* kaj *PAG*, ŝajne opiniante, ke ĉiuj akceptas la aŭtoritaton de tiuj verkoj, sed la realo ne estas tiom simpla.

Witkam notas sufiĉe gravan problemon por Esperanto, ke mankas adekvataj terminaroj kaj detalaj, gramatikecaj leksikonoj, kiaj ekzistas en almenaŭ iuj naciaj lingvoj. En propono pri daŭrigo de la esplorado, unu el la taskoj estus terminologia laboro. Tamen li opinias, ke jam nun li povus trakti komercon, danke al la internacia komerca vortaro de Muniksma (kiu inkluzivas Esperanton), kaj eble internacian juron, pro la laboroj de Lapenna kaj per utiligo de *Internacia jura revuo*. Terminaristoj, jen defio por vi! Certe necesos ankaŭ profesia, ŝtata financata laboro.


Witkam diras, ke tri sendependaj konsilistoj taksis la raporton DLT tre bona, kio helpos akiri financadon por daŭrigi la esploron, por konstrui dum kelkaj jaroj provsistemon. Tamen la grava financa krizo de EK eble bremsos la progreson de ĉi tiu interesega projekto.

Estas du teknikaj/merkataj problemoj por DLT. La hejma ricevilo devus esti multe pli kosta ol unulingva ilo. Witkam esperas, ke ĉiuj hejmoj havos la necesan akcesoran videodiskan aparaton, pro aliaj uzoj, kaj eble tio validos (la projekto ja ne plene funkcios antaŭ la naŭdekaj jaroj).

La dua problemo estas la nerapida prezento de tradukata teksto. Laŭ la nuna raporto, la malrapido de aliro al leksika kaj gramatika informoj sur la videodisko estas la kaŭzo, ke teksto prezentiĝus je 600 vortoj en minuto. Nemalmultaj homoj legas pli rapide ol tio, kaj ĉiuj supraĵe legetas je multe pli alta rapideco. Nia PLATO-sistemo, uzata ne nur por instruado sed ankaŭ por aliaj informoceloj, prezentas tekston je 1 800 vortoj en minuto, kaj oni jam plendas, ke ĝi lamas kompare kun iuj novaj mikrokomputiloj. Do oni devos multe strebi por plirapidigi la tradukadon en DLT. Alikaze la konsumantoj postulos rektan transsendon de la elektita nacia lingvo. Private Witkam informas, ke rapideco ne estas problemo por iuj uzoj, ekzemple subtitoligo de filmoj (pro mallongaj frazoj), ricevo kaj eltajpo dum foresto de la uzanto (elektronika poŝto ktp.), kaj ŝlosilvortaj serĉoj (por kiuj la maŝino tradukus nacilingvan ŝlosilvorton en Esperanton, por fari komputilan serĉon tra la Esperanta teksto). Tamen por multaj celoj la nun planata rapideco estus tro malalta.

La raporto estas klara, en bona angla (eĉ se negravaj eraroj troveblas). Estas resumoj en la franca, germana, nederlanda kaj dana, sed bedaŭrinde ne en Esperanto, kiun Witkam bone regas. Tiu foresto supozeble estas intenca politiko, ĉar en la tuta raporto Esperanto estas prezentata ne kiel homa perilo sed tute science kiel utila rimedo por DLT.

Bruce Arne Sherwood



Nova rolo por Esperanto en la aŭtomata tradukado: Toon Witkam (maldekstre sur la foto) kun sia ĉefa kunlaboranto en la projekto DLT, Alex Olde-Kalter, lingvisto kiu laboras ĉe BSO en Utrehto.

Verkistoj organiziĝas

Per la suba artikolo Jiří Karen invitas la literature interesitajn esperantistojn al debato pri sia faka agado. Li levas plurajn problemojn i.a. pri la eldonado kaj vendado de libroj, kiuj ŝajne en iu aŭ alia formo frontas la Movadon jam de la apero de la Unua Libro en 1887. Eble ne necesas aldoni, ke UEA konscias pri la problemoj. Ja pro tio fondiĝis la Scienca Eldona Centro de UEA ĝuste en Budapeŝto. Sed multo ankoraŭ restas farenda. La fondo de efika asocio por la esperantistoj, kiuj verkas en Esperanto, certe estas tre bonvena, ĉar la problemoj estas tiel gravaj, ke ili bezonas konstantan kaj fakan atenton. Krome, tia asocio povus multe fari por altigi la prestiĝon, kiun nia tuta kulturo meritas ekster la propraj rondoj de la Esperanto-movado.

En la 68a Universala Kongreso de Esperanto oni fondis organizaĵon de aŭtoroj, kiuj verkas en Esperanto: Esperantlingva Verkista Asocio (EVA). La membroj de EVA estas ne nur pure literaturistoj, sed ankaŭ aŭtoroj de seriozaj verkoj scienc-teknikaj kaj lingvistikaj. Tiu strukturo tamen estas nur provizora, ĉar la celoj, metodoj kaj formoj de la verkado surbaze de arto unuflanke kaj scienco aliflanke estas tre diferencaj. Ĉu la nova organizaĵo povos fariĝi vigla centro de instigaj informoj por siaj anoj, surbaze de organo, kiu prezentos al siaj membroj, vivantaj en diversaj sociaj kondiĉoj, fruktodonajn variaĵojn de laborkonceptoj? Kion fari, por ke ni sukcesu? Unue ni devas diskuti pri niaj celoj kaj due ankaŭ pri la rimedoj – kiamaniere niajn celojn realigi. Se ni ne popularigos nian aferon en la gazetoj kaj renkontiĝoj, se la afero ne fariĝos afero de komuna intereso por la esperantistaro, ni malsukcesos.


Mi volas fari kelkajn personajn rimarkojn rilate al celoj kaj la rimedoj por realigi ilin. Proponinte per EVA doni firman bazon por aktiva kunlaboro inter la aŭtoroj, ni devas klare difini kiamaniere ni volas realigi tiun celon. Miaopinie ni devas klare difini la ĉefajn problemojn, vigle diskuti per korespondado pri la eventualaj solvoj. La korespondado prenas tempon, kiun la verkisto bezonas por verkado. Sed la membroj de EVA devas koni kaj kompreni unu la alian. Por korespondi oni bezonas adresaron de la membroj de EVA. Surbaze de la korespondado oni povas krome aranĝi personajn kontaktojn inter la aŭtoroj. Se vizitas verkisto, oni devas uzi tiun okazon por prezenti lin al kolegoj-verkistoj, kiel ankaŭ al la literaturema publiko. Kontaktojn oni povas realigi ankaŭ okaze de naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj. Renkontiĝo de aŭtoroj estu normala okazaĵo – kaj ne nur renkontiĝo de aŭtoroj kun aŭtoroj, sed ankaŭ de aŭtoroj kun la publiko. Miaj spertoj estas bonaj. La verkistoj devas propagandi unu la alian. Ni devas prezenti niajn verkistojn al la esperantista, sed ĉefe al la neesperantista publiko. Tiaj renkontiĝoj estas plej efika ilo por inteligenta informado pri Esperanto. Oni devas anticipe prilabori la planon por ili okaze de la UK kaj aliaj aranĝoj. Ni devas organizi ne proprajn renkontiĝojn, sed ĉiam lige kun alia aranĝo.

Krom eldoni adresaron en la formo de belaspekta kaj presita libreto, kiu estos nia vizitkarto antaŭ la neesperantista publiko, ni devus klopodi jure defendi la profesiajn interesojn de la anoj de EVA. Ĉu ni havos realajn rimedojn por tio? Unu el la kondiĉoj por tio estas ekzisto de bibliografia servo, tiel ke la organizaĵo povu scii, kion kiu kie publikigis. Ĉu eblus ĉe EVA starigi komisionon el juristoj, kiuj konas la internacian juron pri aŭtorrajtoj? Por havi superrigardon oni bezonus en ĉiu lando komisii anon, kiu informu pri tiuj publikaĵoj la asocion. Ni bezonas sisteme organizi tradukon de originale verkitaj verkoj, kiuj estu eldonitaj prefere de neesperantista eldonejo. Kompreneble la verkoj devas esti literature valoraj kaj allogaj, por ke la propono estu sukcesa. Por tiuj servoj la respektiva persono ricevu financan rekompencon. Esperanto-eldonejoj eldonu originalaĵojn en Esperanto; naciaj kaj ŝtataj eldonejoj eldonu la tradukojn el Esperanto aŭ tradukojn de verko en alian lingvon pere de Esperanta traduko. Nur tiamaniere oni – almenaŭ en orienta Eŭropo – povas defendi la rajtojn de niaj aŭtoroj.

Alia punkto de la programo devas esti kreado kaj kreskigo de prestiĝo por la Esperante verkita aŭ tradukita literaturo ĉe la esperantistoj, sed ĉefe en neesperantistaj medioj. La libroj eldonataj en Esperanto estas laŭ orient-eŭropa vidpunkto tro multekostaj por ordinaraj homoj. Aĉeti tiujn librojn estas malfacile ne nur pro la prezo, sed ankaŭ pro tio, ke en multaj landoj oni ne povas akiri devizojn, por pagi por eksterlanda eldonaĵo. Krome multaj landaj organoj ne informas pri la apero de eksterlandaj libroj. Ĉu EVA eldonu por la bezonoj de la membroj bibliografian bultenon? Ne ĉiuj povas aboni la centran revuon *Esperanto* aŭ gazetojn tiaspecajn. Al multaj homoj do mankas informoj pri aperintaj verkoj. La libron oni devas vidi – oni ne aĉetas librojn nur laŭ anonco en revuo – ofte nur okaze de Universala Kongreso oni povas trarigardi la sortimenton de niaj publikaĵoj.

La informadon helpus pli ofta aperigo de kritikaj informoj pri la valoro de la libroj. Oni devas publikigi la reagojn de la legantoj kaj de la publiko eĉ neesperantista. Oni organizu ekspoziciojn de niaj libroj ankaŭ helpe de bibliotekoj kaj aliaj kulturaj institucioj. Ni preparu literaturajn vesperojn en la kluboj pri niaj verkoj. Kluboj organizu por neesperantista publiko la prezentadon de niaj aŭtoroj. La kluboj nun

Foto: Jovan Ošap



Parto de la verkista rondo, kiu kunsidis en Budapeŝto (de maldekstre): Tibor Sekelj (Jugoslavio), Wouter F. Pilger (Nederlando), Aldo de' Giorgi (Italio) kaj Bernard Golden (Hungario).

apenaŭ tion prizorgas, kvankam nia literaturo prezentas aparte fekundan kampon por interesaj klubvesperoj. Ni fondu ĉe ĉiu nacia organizaĵo esperantistan literaturan sekcion, kiu prizorgu tiujn taskojn.

Laŭ mi ni devas ŝanĝi la karakteron de niaj lingvokursoj. Ni varbas diversajn personojn, ni klopodas lernigi ilin laŭ la lernolibroj, sed – miaj spertoj montras, ke multaj kulture valoraj homoj, eĉ verkistoj en nia lando, iam komencis lerni Esperanton en iu kurso, sed perdis baldaŭ la intereson. Kial? Niaj kursgvidantoj deziras, ke ĉiuj parolu kaj skribu la lingvon. Sed tio estas tre malfacila tasko. Por la homoj ofte sufiĉas pasiva kono de la lingvo. Por plejparto de la inteligentaj homoj, ekzemple la verkistoj, sufiĉas, ke ili povu legi tekstojn kaj kompreni, kiam iu parolas. Tiaj homoj lernu unuavice gramatike analizi tekstojn, tekstojn literaturajn, ĉar literaturistoj bezonas nur tiajn. Kaj la verkisto aŭ tradukisto bezonas baldaŭ atingi rezultojn: kompreni la tekstojn. Tiuj kulture altnivelaj homoj normale konas kelkajn lingvojn, do oni devas instrui ilin alimaniere ol la homojn, kiuj scipovas nur sian gepatran lingvon. Kaj la homo kiu povas tuj legi nian literaturon tre rapide aĉetos niajn librojn, tre rapide li ekkomencos korespondi kaj poste traduki aŭ originale verki, se li konstatas, ke valoras tiu laboro, ke kono de Esperanto alportas al li rapide kaj facile la moralan aŭ alian profiton surbaze de liaj konoj.

Ni bezonas la legantojn kaj aĉetantojn, ni bezonas la aŭskultantojn kaj entute la publikon, kiu komprenas Esperanton. Ni bezonas legantojn, kiuj estas kulturemaj, literaturemaj. Mi propagandas Esperanton inter miaj kolegoj-verkistoj ĉi tiel: mi metas sur tablon en la verkista klubo aŭ aliloke tre bele eldonitan libron literaturan. La kolego demandas, kio ĝi estas. Li konstatas la ekziston de Esperanto kiel literatura fakto. Proprainiciate li petas informojn. Poste mi montras al li pli facilan sed literaturan tekston, analizante la tekston. Sufiĉas informi pri deklinacioj, pronomoj, pluralo kaj, se la homo konas kelkajn lingvojn, li aŭ ŝi baldaŭ legos kaj kun mia helpo komprenos la tekston. Poste mi montras al li revuojn, librojn, katalogojn kaj – li estas kaptita. Kiu volas aktive uzi la lingvon, tiu jam interesiĝas kaj studas mem. Sed oni devas ĉefe montri al la verkistoj klare kiujn profitojn alportos la kono de Esperanto. Ili tuj demandas pri la ekzisto de eldoneblecoj de tradukoj aŭ de la profesia organizaĵo. Tiel mi sukcese varbas en Ĉeĥoslovakio profesiajn verkistojn.

Jiří Karen

Tiuj, kiuj fosas esperante...

D-ro Victor Sadler, antaŭa ĝenerala direktoro de UEA, kiu de post junio 1983 vivas en Brazilo, sendis al ni la sekvan kontribuaĵon – kaj preskaŭ embarasis nin per ĝi. Vi scias, ke nia revuo jam de jaroj aperigas pli-malpli ekskluzive la tekstojn, kiuj iel koncernas la Esperantajn lingvon kaj movadon, la mondan lingvo-problemon kaj kelkajn tiurilatajn temojn. Kial ni nun faras escepton? Unuavice pro la aŭtoro de la teksto, ĉar estas bele aŭdi ion pri li kaj liaj nunaj faroj. Duavice – kaj tio eble pli gravas ĉi-foje – por signali al multaj niaj legantoj, ke Bona Espero bone fartas, malgraŭ tiu cirkulero pri ĝi, kiu vaste distribuiĝis tra la Movado dum la finaj monatoj de 1983. Ni ne donis – nek intencas doni – spacon al tiu cirkulero, ĉar ni ĉiam opiniis, ke la movada signifo de Bona Espero similas al la graveco de kiu ajn el la centoj da lernejoj tra la mondo, en kiuj deko aŭ kelkdeko da gelernantoj studas ankaŭ la Internacian Lingvon. Se Bona Espero tra la pasinta jardeko vaste populariĝis en la Movado, tio ŝuldiĝas al la lerto kaj bona renomo de gesinjoroj Grattapaglia, kiuj estras la bienon/lernejon Bona Espero. Restas malferma la demando, ĝis kiu grado oni rajtas (mis)uzi la Jarlibron de UEA por la disvastigo de privataj opinioj kaj ideoj, kion tre verŝajne faris la aŭtoroj de la menciita cirkulero. Sed, eble alifoje pri tiu temo. Jen nun la teksto de Sadler:

La malnova ĵipo de la bieno-lernejo Bona Espero haltis, kiam la ŝoforo rimarkis paneintan aŭton ĉe preskaŭ inundita ponto. En la internaj regionoj de Brazilo, ĉiu haltas por helpi alian, ĉar ĉiu ankaŭ mem troviĝas foje en la sama malesperiga situacio: en paneinta veturilo meze de nenie.

Benzinmanko. "Se vi povas doni al ni nur du litrojn, ni jam estos hejme." Facila gesto de la kalozaj brunaj manoj emfazas la malgravecon de la peto. "Kie por vi estas hejme?" scivolas la bonesperano. "La bieno Bona Espero", respondas senhezite la maljuna vojaĝanto. "Ĉu vere? Sed tie loĝas mi, kaj mi ne konas vin, mi opinias..." Sekvas silenta embarasiĝo.

"Nu, ni aŭdis, ke tie oni fosas oron, sinjoro. Ni estas ĉiuj orministoj. Kie estas oro, tie estas nia hejmo."



Duopo kiu havas bonan esperon subite riĉiĝi sur la tereno de Bona Espero. Necesas plufosi. Eble?

"Kaj ĉu vi povas pagi la benzinon?"

"Nun ne, sed ni pagos poste per oro, certe."

La bonesperano, eble kortuŝita de tiuj ahasveroj, cedas la du litrojn. Pagon, evidente, li ne ricevos.

Iuj, tamen, ja elfosis oron. Neniu bone scias, kiel la afero komenciĝis. Iam en aŭgusto, iu vaganta orministo, verŝajne, decidis fosi prove apud la rivero Cobras (Serpentoj), kiu dum ĉirkaŭ 1 km formas la limon de la bieno Bona Espero. La komenca sukceso (ekzistas onidiroj pri unu peco de 165 gramoj) sufiĉis por allogi sammetiulojn el kelkcent-kilometra distanco. Baldaŭ aliĝis ankaŭ loĝantoj de Alto Paraíso, la vilaĝo plej proksima al Bona Espero, eble pro timo, ke "fremduloj" el najbaraj ŝtatoj forrabos la tutan oron el ilia regiono. Ĝis la komenco de oktobro jam laboradis kvardeko da fosistoj kaj kribristoj, ĉiu sur sia parcelo zorge difinita per ŝnuroj strečitaj inter bambustangoj. Inter la konataj vizaĝoj el la vilaĝo aperas ankaŭ du ekslernantoj de Bona Espero, kiuj ambaŭ parolas bone Esperanton.

Verdire, la mino ne komenciĝis en tero de Bona Espero, sed iomete ekster la limo de ĝiaj 10 kvadratkilometroj. Tamen la nov-alvenantoj rapide disvastigis la fosejon, ĝis ĝi invadis la bienon. Krome, la sola alirvojo al la mino estis ĉiam tra la teritorio de Bona Espero. Necesis eĉ krei novan vojon tra paŝtejo por minimumigi la ĝenon al la lernejo.

Ne ĉiuj alvenantoj estis ministoj, precize... Inter la vizitantoj allogitaj de la novaĵo, ekzemple, estis teamo de dudek putinoj (baldaŭ forpelitaj de la vilaĝa policisto) kaj inspektoro el la ministerio de minoj.

Ĝis nun ne estas kaŭzo por timi, ke tiu esperantista institucio en la alt-ebenaĵo de Goiás akiros la famon de Klondyke aŭ de la brazila Serra Pelada. Unu maljuna ministo montris la 7 gramojn, kiujn li sukcesis elterigi (valoro tiam ĉ. 200 gld.), kaj amare ridetis. "Por tiuj mi fosis sep kamionplenojn da tero!" Krom la magra rikolto, estas aliaj bonaj motivoj por rezigni. La vilaĝa vendejestro, kiu komence vidis gloran estontecon en la provizado al la ministoj, ĉesis fari la 34-kilometran veturon kun siaj varoj, kaj iuj ministoj jam turnis sin al (kontraŭleĝa) ĉasado, por sin vivteni. Fine, la pluvsezono alvenis iom malfrue, sed tre senteble, kun temperaturoj falantaj ĝis 16 gradoj Celsiusaj, ŝtormoj kaj pluvriveroj. "Ĉiuj jam foriras", diris unu malseka orserĉisto en la lastaj tagoj de oktobro. La loĝantoj de Bona Espero – kiuj preferas fosi sian legom-bedon – ne lamentas la malaperon de la neinvititaj vizitantoj.

Sed en aprilo, kiam la pluvoj ĉesos, kiu scias...? Tiuj vagabondoj kun fosilo, kribrilo kaj sako da rizo ja vivas de konstanta espero, de la kredo, ke iam, ie, unu bela sonĝo efektiviĝos... Preskaŭ samideanoj oni povus diri.

Victor Sadler



Ĝis la komenco de oktobro jam kelkdeko da fosistoj kaj kribristoj venis serĉi riĉon en Bona Espero.

Juneca sed multvorta kongreso

Jugoslavio apartenas al la landoj sen oftaj Esperanto-kongresoj. Post 1945 estis nur naŭ landaj kongresoj. La plej lasta, la 21a Jugoslavia Esperanto-Kongreso, okazis de la 25a ĝis la 27a de novembro en la slovenia urbeto Škofja Loka. Montriĝis, tamen, ke jugoslavoj ŝatas kongresi. Tion pruvas la alveno de pli ol 300 esperantistoj el ĉiuj jugoslavaj respublikoj, escepte de Montenegro.

La kongreson oni jam anticipe signis labora. La laboro konsistis el sennombraj kaj ofte longedaŭraj, samtempaj kunsidoj de la estraro, komisionoj, fakaj organizaĵoj, sekcioj de internaciaj asocioj kaj redaktaj komitatoj. Oni foje ricevis impreson, ke kelkaj opinias kunsidadon laboro.

La kongresa temo estis "La rolo kaj taskoj de Jugoslavia Esperanto-Ligo en evoluigo de socialisma memadministrado kaj socia progreso de la lando". Tiu temo estis refere, diskute, opiniŝanĝe, akre kaj ĝentile, lerte kaj subnivele traktita en la komisionoj. La temeroj kovris la tutan agadterenon de la Movado. La kongreso devis reekzameni kaj pravigi la uzon de la jugoslava sistemo de reprezentado en la Esperanta agado. Laŭ la vortoj de prof. B. Popović "imiti formojn de amasaj politikaj organizaĵoj ne estas konsilinde, sed adapti la agadon al postuloj kaj agdirektoj de la regantaj sociaj fortoj, tio estas la vojo irenda". La apliko de tiu sistemo de reprezentado iel funkciis en la laboro de komisionoj, sed neniu provis kontroli, kiu el la ĉeestantaj kongresanoj estas reprezentanto kaj kiu ne. La plena sesio ne emis akcepti ĉion en la proponita formo. Laŭ mi, multaj el la konkludoj suferas de troa optimismo sen konkreta indiko pri vojo kiel realigi ilin.

Oni proponis eldoni jugoslavan antologion, penetri en la radion kaj televidon, kontakti soci-politikajn instancojn, enkonduki Esperanton en porinstruistajn kolegiojn kaj plurobligi la membraron de UEA en Jugoslavio. Giganta tasko ĝis 1987!

Inter la kulturaj aranĝoj estis du speciale komponitaj muzikaĵoj, dediĉitaj al la kongreso: la geknaba ĥoro de Županja kantis "Škofja Loka" kaj la artistoj de la Teatro de Osijek muzikigis la originalan poemon de sia samurbano Antun Šimunić. Tamen pleje impresis la grupo de gelernantoj el Maribor, kiu prezentis recitalon el kantado, muzikado kaj sol- kaj ĥordeklamado. Tiuj gejunuloj, per sia poezieca teksto, plena de noblaj ideoj, dementis asertojn, ke por la junularo ĉio malsimila al la plej lasta popularaĵo estas malnova sentimentalismo.

Tiu jugoslava kongreso apartenas al la malmultaj en Eŭropo, kie plimultis gejunuloj. Junaj komencantoj, balbutantoj, sen sperto kaj rutino – sed ili venis. Ili plurkaze vojaĝis mil kilometrojn, por atingi la kongreslokon, sen grumblado. Ili estas esperiga bazo, garantio por la estonteco. Kelkaj el ili ricevis agnoskon inter 150 proklamitaj meritaj unuopuloj kaj organizaĵoj, ĉar la kongreso en sia kadro festis la 75-jaran jubileon de Esperanto sur la teritorio de la nuna Jugoslavio.

Emilija Lapenna

Kial ni diras "Usono"?

Korespondanto sendis al mi la jenan demandon: "Kial kaj kiam oni decidis, ke Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko estu Usono anstataŭ Uŝono?" Manke de etimologia vortaro enhavanta la historion de Esperantaj vortoj kaj propraj nomoj, estas necese fari esploron tra labirinto da vortaroj, konsultlibroj kaj periodaĵoj por trovi la respondon al la enigmo. Efektive, la demando estas triopa: 1. Kion signifas "Usono"? 2. Kiam oni uzis ĝin unuafoje? 3. Kiu enkondukis ĝin en la lingvon?

La unua demando estas plej facile respondebla. Se oni konsultas *Plena ilustrita vortaro* (*PIV*, 1970), oni trovas la jenan difinon: "mallongigo de la nomo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko". La klarigo en *Enciklopedio de Esperanto* (1933-1934) estas simila: "populara formo de landnomo Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko". Alia plena vortaro, eldonita antaŭ sep jardekoj, alimaniere klarigas la signifon de la literoj. En *Plena vortaro Esperanto-Esperanta* (1909-1910) de Émile Boirac, Usono estas "nomo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko el la unuaj literoj U.S.O.N.A. (*United States of North America*)". Nun estas klare, kial "Usono" havas "s" kaj ne "ŝ": ĝi estas formita per kunmeto de la inicialoj de la vortoj en la angla nomo de la lando. Vorto aŭ nomo, konsistanta el la inicialoj aŭ unuaj silaboj de plurvorta nomo aŭ esprimo, nomiĝas akronimo. Povas esti, ke "Usono" estas la unua akronimo, kiun oni ekuzis en Esperanto.

Pli frua vortara registro de "Usono" okazis en 1908 en la angla-Esperanta vortaro de Joseph Rhodes, eldonita en Londono. La Esperanta ekvivalento de *United States of America* estas "Unuiĝintaj Ŝtatoj, Usono". Ĉar Rhodes ne listigas "Usono" kiel novan radikon, kiun li mem enkondukis, estas necese serĉi pli fruan dokumentadon. En 1908 en Ĉikago, Usono, estis eldonita la lernolibro de Arthur Baker. Ĝia vortareto enhavas nur "Ameriko", sed en la adreso de letero troviĝas "Ĉikago, U.Ŝ.A.". Estas evidente, ke tie ĉi temas pri mallongigo de la Esperantaj vortoj

"Unuiĝintaj Statoj Amerikaj". La sama esprimo estas registrita en la anglaj vortaroj de J.C. O'Connor (Londono, 1907) kaj A. Motteau (Londono, 1906). En *Fundamenta krestomatio* (unua eldono, 1903) kelkaj artikoloj mencias Usonon, sed ĝi estas nomata "Nord-Amerikaj Ŝtatoj", "la Unuiĝintaj Ŝtatoj", "la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko" aŭ simple "Ameriko". "Ameriko" aŭ "amerika" estas uzata en la titoloj de la plej fruaj usonaj esperantistaj organizaĵoj kaj periodaĵoj: Amerika Esperantista Asocio (1905), *Amerika esperantisto* (1906), *Amerika esperantista revuo* (1907), Esperantista Asocio de Norda Ameriko (1908). Nur en 1912-1913 aperis la revuo *Usona esperantisto*. En la unua volumo de la fama beletra periodaĵo *La revuo* (1906-1907), la formo de la landnomo estas "Unuiĝintaj Ŝtatoj", sed en 1909 "Usono" estas uzata, do la nova mallongigita formo de la landnomo plej probable estiĝis en 1908 aŭ eble malfrue en 1907.

Estas eble ekscii, kiam d-ro Zamenhof uzis "Usono" la unuan fojon. Laŭ *Zamenhofa radikaro* de Eugen Wüster, "Usono" estas neoficiala zamenhofa radiko trovebla en du publikigitaj verkoj, "Lingva Respondo" 47 en *Oficiala gazeto* (1911), kaj la paroladoĉe la sesa Universala Kongreso en Vaŝintono en aŭgusto 1910. En siaj leteroj Zamenhof kutime uzis "Ameriko", "Unuiĝintaj ŝtatoj", "Norda Ameriko" kaj "Nord-Amerikaj Unuigitaj Ŝtatoj", sed la 30an de majo 1910 li skribis al generalo Sébert, la direktoro de la Centra Oficejo en Parizo, por informi lin, ke "De s-ro Reed mi ricevis la sciigon, ke la Usona registaro sendos al la aliaj registaroj oficialan inviton por nia kongreso..." La korespondanto menciita de Zamenhof estis Edwin C. Reed, usona ekonomikisto kaj advokato, kiu estis pioniro de la usona Esperantomovado kaj oficis kiel sekretario de Esperantista Asocio de Norda Ameriko de 1908-1913. Reed skribis al Zamenhof jam en septembro 1908 rilate la organizadon de la sesa Universala Kongreso, kaj la 25an de oktobro 1908 aperis en *Oficiala gazeto* la sekva informo pri venontaj kongresoj: "...La Kongreso aprobas, ke la du venontaj kongresoj okazu, unu en Chautauqua (Usono) kaj la alia en Hispanujo, ambaŭ dum la jaro 1909..." Sed duonjaron antaŭ ol "Usono" aperis en *Oficiala gazeto*, Joseph Rhodes skribis en aprilo la enkondukon de sia vortaro, do ĝia kompilado tiam estis finita. La angla vortaristo plej verŝajne ĉerpis "Usono" el iu eldonaĵo, laŭ mia konjekto, el Ameriko, en kiu usona esperantisto, eble s-ro Reed mem, formis akronimon surbaze de la nomo de la lando en sia gepatra lingvo.

Bernard Golden

Recenzoj

Esperanta ĉefverko en nederlanda traduko

Het Kinderras; Gedicht in 25 Hoofdstukken (1955), William Auld (1924). El Esperanto en la nederlandan trad. W.A. Verloren van Themaat (1931). Amsterdam: Tor, 1982. 88p. Ilus. 21cm. ISBN 90 70055 384. Prezo: 19,80 gld.

"Faru nacilingvajn tradukojn el Esperanto" oni konsilas. Mi eĉ legas en gazeto, kiu alvenis hodiaŭ, "Ni povas eldoni nacilingvajn bonajn tradukojn de originalaj verkoj por gajni monon". Ho, naiveco! Gajni monon pere de verkado aŭ tradukado, eĉ trovi eldoniston, malofte dependas de la kvalito de la verko. En preskaŭ ĉiu lingvo senvalorajoj povas eldoniĝi kaj bonaj verkoj resti en tirkesto.

Do mi laŭdas la diligenton kaj persiston de d-ro Willem Verloren van Themaat, kiu sukcesis eldoni sian nederlandan tradukon de la plej rimarkinda poemo en nia literaturo: *La infana raso* de William Auld. Jam antaŭe li konatigis nian poezion al nederlandanoj en *Zeg, luister eens*, kolekto de nederlandaj tradukoj de alilingvaj poemoj, al kiu li kontribuis poemojn de Kalocsay, Auld, Ragnarsson kaj De Kock. Espereble la nova traduko trovos aĉetantojn, ĉar poezio, orginala aŭ tradukita, ne estas facile vendebla en Nederlando, kaj ne nur tie.

Oni ĝenerale konsentas, ke *La infana raso* estas ĉefverko en nia literaturo. Ĝi aperis en 1956 kaj estis vaste legata. En kelkaj landoj, kie la Esperantomovado tiam suferis persekutadon, ĝi rondiris manuskriptforme. Oni nomas ĝin epopeo, ĉar ĝi prezentas vivfilozofion: la homo estas nura infano; eble iam li kreskos al stato, en kiu regas paco kaj racio, sed "multaj larmoj necesas antaŭ tio". Ĝi ne prezentas sian temon en daŭra rakonto, kiel ekzemple alia epopeo, *Paradizo perdita* de Milton, sed traktas ĝin epizode, per poezifragmentoj unuavide senrilataj. Oni povas ĝui la poezion de Dante kaj Milton, kvankam nuntempe neniu kredas ĉion, kion ili kredis, kaj oni povas trovi la epopeon de Auld ĝuinda kaj pensiga eĉ malakceptante lian filozofion. Ĝi defias la kritikanton: se vi pretendas scii pli bone ol Auld, verku epopeon pli bonan! Ĝis nun neniu faris tion.

La verko tiel rafinite uzas la eblecojn de nia lingvo, ke ĝi prezentas al tradukanto malfacilan taskon, sed Verloren van Themaat bone, en kelkaj ĉapitroj brile, sukcesis. Ŝajnas al mi, ke tiuj ĉapitroj, kiuj plej plaĉas al mi en la orginalo, la pli koheraj kaj malpli epizodaj, ankaŭ estas plej bone tradukitaj. Mi mencias, ekzemple, ĉapitron 1, pri prapatroj, ĉapitron 3,

pri la rilato inter patrino kaj filo, ĉapitron 5, pri amo kaj amoro, ĉapitron 18, pri lingvo.

Eraroj estas malmultaj: nekomprenebla (espereble preseraro!) estas ĉapitro 20 *stalen ketel* (ŝtalkaldrono) anstataŭ "ŝtalkitelo" (en ĉapitro 1 li donas bonan tradukon de "sklavkitelo") kaj en la sama ĉapitro: "agulaj", pri okuloj, signifas "de homo aganta", ne *adelaars* (aglaj). "Mistifike" en ĉapitro 2 estas mistradukita kiel "mistike". "Dezerto" en ĉapitro 7, ne estas *verlatenheid* sed *woestijn* kaj en la sama ĉapitro "brava" ne estas *braaf*. En la noto ĉe ĉapitro 5 "atakita" (*assaulted*) estas *aangevallen*, ne *aangerand*. La noto ja temas pri prudeco: la britaj ĵurnaloj tiam (kiom la mondo ŝanĝiĝis en generacioj!) evitis mencii seksperforton. Fakte, ĉu ne estus konsilinde iom aktualigi la notojn? Kelkaj rilatas al faktoj ne plu ekzistantaj aŭ seninteresaj. La akreco kontraŭ teologoj, kies dentoj ja malakriĝis, kaj la silento rilate al totalismaj ŝtatoj apenaŭ estas laŭ la spirito de la verko.

Kiel sukcesigi ĉi tiun kuraĝan entreprenon? Vi, nederlanda esperantisto, aĉetu la tradukon, eĉ se vi preferas la originalon, kaj donu ĝin al amiko, kiu amas poezion. Ili ankoraŭ ekzistas, malgraŭ tio, kion oni (sed ne Auld) nomas progreso.

Albert Goodheir (Britio)

Ekzemplo de bona terminaro

Angla-Esperanta telekomunika vortaro, Christian Bertin (1949). Rennes: Bretagne en Direct/Breizh War-Eeun, 1983. 70p. Ilus. 21cm. Prezo: 12,30 gld.

Okaze de la Monda Komunika Jaro – 1983, aperis ĉi tiu vortaro de telekomunikaj terminoj kaj esprimoj. Ĝi estas ellaborita surbaze de jam ekzistantaj (provoj de) Esperanto-terminaroj pri tiu kaj najbaraj fakoj. Mi ne estas telekomunikisto, do pri la faka enhavo mi ne kompetentas. Sed tio ne signifas, ke mi ne povus prijuĝi ĝin el la vidpunkto de uzanto de la lingvo kaj uzanto de pluraj pritraktataj komunikadosistemoj.

La vortaro estas ekzemplo pri la maniero en kiu oni faru terminaron. Oni ekiru de ekzistanta internacia faka terminaro (norma). La difinon de la esprimoj jam donis la koncernaj internaciaj normigaj komisionoj. Ni bezonas eltrovi nur la taŭgajn Esperanto-versiojn de la esprimoj. Certe tio ne estas facila afero. Se ekzistas diversaj esprimoj por "selekti", "ciferumi", "numerumi" (rilate telefonon), tiuj ankaŭ en Esperanto sonu malsame, tiom kiom temas pri malsama ago aŭ funkcio. Oni do normigas vort-uzon. Sed la vorto-trezoro, kiun oni utiligas, estas plejparte la komunuza vorto-stoko de la lingvo. Ne necesas elpensi belajn novaĵojn, ĉar ankaŭ alilingve la teknikistoj ja uzas normigitajn komunuzajn esprimojn. En ĉi tiu vortaro oni apenaŭ trovas fakvortojn nekompreneblajn por ne-inicitoj. Kaj tiuj, kiuj enestas, ŝajnas neeviteblaj.

Post tia elekto de la uzendaj vortoj, plej multaj esprimoj estas tuj kaj senprobleme tradukeblaj. Certe oni foje povas dubi pri la plej eleganta kaj trafa vortumo, sed kiam klara esprimo estas trovita, tia diskuto ne plu estas esenca.

Pri iuj elektoj mi – kiel laiko – iom dubas: ĉie oni nete diferencigas inter "selekti" kaj "numerumi". Kial do *forward end of selection signal* estas "signalo de numerum-fino"? Sub *document facsimile* ni trovas "telekopiaĵo" por la aĵo kaj "telekopio" por la agado. Laŭ mi preferindas "telekopio" por la aĵo kaj "telekopiado" por la agado. Ĉe "ter-konekto", en Anglujo oni uzas *earth* (tero), en Usono *ground* (tero, grundo, bazo). Tio ŝajnas al mi nesufiĉa kialo por enkonduki en Esperanton du formojn "ter-konekto" kaj "grundkonekto"! Kial imiti anglalingvan disdialektiĝon?

Ofte la Esperanto-versio estas pli klara ol la angla. Ekzemple *faulty link information* tradukiĝas kiel "informo pri difektita interligo", dum laŭ mia kompreno, la anglaĵo povus ankaŭ esti "fuŝa informo pri interligo".

Pro la rapideco de produktado, mankas ankoraŭ esperantlingva indekso. Tiun mankon oni kiel eble plej rapide riparu.

La redaktoro aldonis plurajn tabelojn de sendokodoj, komunikado-alfabetoj. Pri tiuj mi ŝatus fari iujn komentojn, kiuj elsaltas el la kadro de recenzo, ĉar respondecas pri ili ne la aŭtoroj aŭ redaktoro, sed la koncernaj komisionoj de CCITT (Internacia Konsultiĝa Komitato pri Telegrafio kaj Telefonio).

Unue ni konstatu, ke ĉiuj montritaj telekomunikaj alfabetoj (escepte de la antikva telegrafa/teleksa alfabeto, por kiu oni devas transskribi ĉ=ch/cx ktp.) ebligas taŭge skribi Esperanton. Preskaŭ ĉiuj eĉ ebligas tute ĝustan rondan hoketon super u! Do, el telekomunika vidpunkto, la Esperanto-ortografio ne prezentas problemojn. Sed enestas ekzemple tabelo, kiu prezentus la literojn kun diakritoj de "la latinliteraj lingvoj, inkluzive de Esperanto". Nu, ĝi *ne* prezentas la super- kaj sub-signojn de *ĉiuj* latinliteraj lingvoj. Mankas la sub-signo "punkto" de la vjetnama; mankas iuj diakritoj por iuj afrikaj lingvoj. Pluraj kombinoj kun ja montritaj diakritoj mankas. Ne eblas meti du supersignojn super unu litero, kiel necesas por la vjetnama.

Ankaŭ la alfabetoj kun "specialaj literoj" (ne formeblaj helpe de aparta super- aŭ sub-signo) ne estas kompletaj. Mankas diversaj literoj, necesaj por skribi i.a. la laponan, la vjetnaman, la haŭsan, la evean kaj diversajn aliajn lingvojn de Afriko. Sed jes ja enestas ĉio necesa kaj oportuna por la latinliteraj eŭropaj lingvoj (escepte de la lapona). Eŭropo-centrismo, do. Supozeble kulpas pri tio la telekomunikaj instancoj

de iuj landoj, kiuj pripensas nur la utiligon de la kutima (eks)kolonia lingvo por (internacia) komunikado. La teknikistoj verŝajne ne kulpas. Ĉar, se por la dana enestas *æ*, por la germana *ß*, por la franca *œ*, por la nederlanda *ij* kaj eĉ *'n* – kial ne por la evea *f*, por la fona *ɛ*, por la lapona *ʒ*? Aŭ, alivorte, se mankas *y* por i.a. la evea, kial do enestas *þ* por la islanda? Se la montritaj tabeloj estas la "internaciaj" kaj ne nur-eŭropaj (kaj nur-eŭropaj ne havus sencon!), do restas multo dezirinda. Pri la elmontro de ne-latinliteraj alfabetoj eĉ ne troviĝas spuro da indiko. Ĉu tiuj, kiuj havas "latinliteran aparaton", ne povu komuniki kun aŭ per alialfabeta lingvo? Kaj reciproke?

Okaze de la Monda Komunika Jaro oni ja kredigas al ni, ke baldaŭ ĉiu, ĉie, povos konsulti komputilajn inform-bankojn ĉie en la mondo. Ke baldaŭ enkondukiĝos manieroj de per-satelita (skriba) telekomunikado eĉ "malpli kostaj ol nuntempaj lokaj telefonaj interparoloj". Iuj proponas meti teleskribilon en ĉiun afrikan vilaĝeton. Sed kiom tio helpas, se eventuala uzonto devas ne nur kapabli skribi, sed ankaŭ koni eŭropan lingvon aŭ Esperanton por povi kontakti sian pliaĝan fraton transloĝiĝintan?

Kial ni zorgu pri tio? Ja ĉiuj telekomunikaj alfabetoj prezentitaj ebligas taŭge skribi Esperanton. Kion plu ni volas? Tamen, laŭ mi, ni esperantistoj ne estu kontentaj, ĝis *ĉiu* povos utiligi la komunikadajn retojn egalrajte per sia propra, aŭ per kiu ajn dezirata, lingvo.

Wouter F. Pilger (Nederlando)



Aperis nova volumo en la renoma Serio Oriento-Okcidento de UEA. Temas multrilate pri unika verko, kiu mankas al la plimulto de la naciaj lingvoj:

Tibor Sekelj

ELPAFU LA SAGON

el la buŝa poezio de la mondo

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1983. 187 paĝoj, 21cm. Prezo: 27,00 gld. (broŝurita); 36,00 gld. (tole bindita), plus sendokostoj. Kutima triona rabato ĉe samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj. Mendu ĉe la libroservo de UEA.

Ne hezitu eklegi!

Antologio de argentinaj noveloj. Red. Bastono de Kordobo (ps.). El la hispana tr. diversaj. Diamanto: Argentina Esperanto-Muzik-eldonejo, 1979. 200p. Ilus. 18cm. Prezo: 13,50 gld.

La modesta aspekto de la libro longe ne logis min al legado. Sed kiam mi komencis, mi ne haltis ĝis la finlego.

La libro estas bunta elekto de rakontoj de dek aŭtoroj en traduko de tri lingvospertuloj, kaŝintaj sin malantaŭ pseŭdonimoj. Oni vagas kun la aŭtoroj tra tiu lando, ekzotika por alikontinentanoj, konatiĝas kun pitoreskaj pejzaĝoj, homoj, bestoj kaj plantoj. Iuj rakontoj estas tre dramecaj, multaj estas penetritaj de humuro.

Argentino estas sufiĉe nova lando, plena de enmigrintoj aŭ de ties idoj. Estas kurioze observi, kiel la homoj adaptiĝas al tute novaj kutimoj kaj cirkonstancoj. Por mi persone estis aparte interese legi pri la vivo kaj aventuroj de enmigrintoj el Rusio.

Utilaj estas informoj pri la aŭtoroj, transskribo de propraj nomoj kaj ilustrita glosaro pri argentinaĵoj.

Do ne prenu mian malbonan ekzemplon, ne hezitu antaŭ eklego de ĉi tiu libro.

Boris Kolker (Soveta Unio)

Por kvinminuta lego

Mikronoveloj de Sin'iti Hosi, Sin'iti Hosi (1926). El la japana trad. Kikunobu Matuba. Tôkyô: Libroteko-Tokio, 1983. 76p. Ilus. 18cm. Prezo: 21,00 gld.

Malfacile recenzebla libro – ĉar, rakontanta pri la rakontoj, mi fuŝus la plezuron de legontoj. Nu, de tiuj, kiuj legas por solvi enigmojn; aliaj ĝuos pro la stilo. Temas pri rakontoj legeblaj dum ĉirkaŭ kvin minutoj, iuj en scienc-fikcia kadro, aliaj pri simile fantaziaj situacioj en japana komerco.

Mi tamen resumos unu, kies solvon mi divenis tro frue: Junulo petas postenon ĉe entrepreno R. Oni sendas lin dungiĝi ĉe entrepreno K, por poste spioni. Komence li devas gajni konfidon. Sed li tro sukcesas. Kiam li jam estras la kompanion, la rivalo anoncas, ke li spionas, – kaj bankrotas pro kalumnio.

Kaj jen alia komenco: Fotisto en turisma loko malprosperas pro ĉiesaj fotiloj. Li ekloĝas apud prizonpordo, teleskope fotas elirantojn...

Ĉu sufiĉe por logi? Espereble mi ne tro fušis. Kaj la bildoj estas belegaj.

Kris Long (Britio)

Laste aperis . . .

Auli: Rakonto pri knabeto (1934), Hendrik Adamson (1891-1946). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983 (represo). Romano pri malriĉa kampara medio, de verkisto plej bone konata pro siaj estonaj kaj Esperantaj poemoj; kun postparolo de Jan Ojalo. Prezo: 14,10 gld.

Curs elementar de esperanto, Ignat Florian Bociort (1924) kaj Mioara Lacrima Dobre. Timişoara: Universitatea din Timişoara, 1983. 131p. 21cm. 13-leciona elementa lernolibro por kursoj kun legaĵoj kaj konversacia frazaro, ampleksanta duonon de la libro. Prezo: 9,00 gld.

Helpmaterialo por fakultativa kurso de Esperanto en 6-11a klasoj, Johannes Palu (1913). Tallinn: Eesti NSV Haridusministeerium, 1983. 73p. Mimeo. 19cm. 40 legaĵetoj kun vortareto por oficiala lerneja instruado. Prezo: 4,50 gld.

Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio; Iom da historio kaj iom da rememoroj, Stanislav Kamarýt (1883-1956). Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1983. 251p. 20cm. Kun ampleksaj (60p.) bibliografia kaj biografia indeksoj. Prezo: 16,20 guldenoj.

Kantfesto 1 (1982), red. Marta Evans. Montreal: Kanada Esperanto-Asocio, 1983 (2a eld.). 100p. Ilus. 22cm. Okdeko da kantoj diversnaciaj, novaj kaj malnovaj, kun muziknotoj. Prezo: 16,20 guldenoj.

Kantfesto 1 (1983), red. Marta Evans: Kanada Esperanto-Asocio, 1983 (2a eld.). 52p. (nenumeritaj). Ilus. 22cm. Kantotekstoj por la samnoma kantaro. Prezo: 8,10 guldenoj.

Kiel kovi, Lin Songying. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 24p. Kolorilus. de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. 88-Es-196P. Rakonto pri laboremo por junaj infanoj. Prezo: 2,70 gld.

Kio estas SAT?, Henri Masson. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais, "Laŭte", 1983 (neindikita). 24p. 21cm. SAT-Broŝurservo. Informbroŝuro pri la historio kaj celoj de Sennacieca Asocio Tutmonda. Prezo: 1,80 gld.

Laktisto de Mäeküla (1916), Eduard Vilde (1865-1935). El la estona trad. Valev Kruusalu. Tallinn: Eesti Raamat, 1983. 255p. Ilus. 17cm. Fama soci-psikologia romano, kies okazaĵoj estas el la fino de la 19a jarcento, pri la deziro iĝi bonstata je ajna kosto; postparolo de Aadu Hint. Prezo: 13,50 gld.

Londono kantas, Londona Esperanto-Ĥoro. Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1983. Kaseto, kun tekstfolioj. 20 popularaj kantoj; provizas facilan rimedon instrui kaj praktiki la lingvon per komuna kantado. Prezo: 16,50 gld.

Malatentema virino, Fang Yang. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 21p. Kolorilus. de Zhou Xianche. 88-Es-197P. Rakonto pri malatenta patrino, por junaj infanoj. Prezo: 2,70 gld.

Materada (1960), Fulvio Tomizza (1935). El la itala trad. Pier Giorgio Soranzo (1933). Pisa: Edistudio, 1983. 159p. 21cm. ISBN 88 7036 017 2. La unua romano de nun fama verkisto, pri familio dividita pro heredaĵo, trafita de devo elmigri. En 1980 la aŭtoro ricevis aŭstran premion por eŭropa literaturo. Prezo: 24,00 guldenoj.

Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (1932), Leo Polak (1880-1941). El la nederlanda trad. F. Munniksma. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais, Laŭte!, 1984. 15p. 21cm. SAT-Broŝurservo. Radioprelego, kiu defendas la liberpensan filozofion kontraŭ la ordona kredomoralo. Prezo: 1,80 guldenoj.

Nobela burĝo, La, Molière (Jean Baptiste Poquelin, 1622-1673). El la franca trad. Richard Levin (1902-1969). Parizo: UFE, 1983. 68p. Ilus. 21cm. Speciala literatura numero de *Franca esperantisto*, n-ro 347. Teatraĵo, kiu ridindigas la novriĉulojn. Prezo: 7,50 gld.

Nokta flugo (1931), Antoine de Saint-Exupéry (1900-1944). El la franca trad. Henri Vatré (1908). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 66p. 20cm. Jubilea eldonserio: 2 Beletro tradukita 2. Priskribo de la tragika aventuro de unu el la fruaj aviadistoj, la fama aŭtoro de *La eta princo*. Prezo: 8,10 gld.

Ora hakilo, Fang Yuan. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 28p. Kolorilus. de Yang Yongqing. 88-Es—195P. Rakonto pri la valoro de honesteco. Prezo: 3,30 gld.

Por la praktikantoj; Pluaj paŝoj al vivanta lingvo (2a eld. 1967), P. Babin. Baugé: Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 1983 (4a eld.). 85p. Ilus. 27cm. 20-leciona internacia lernolibro, taŭga por paroligi progresantojn. Prezo: 10,80 gld.

Unueco super prokreda dividiĝo (1931), Leo Polak (1880-1941). El la nederlanda trad. F. Munniksma. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais, "Laŭte!", 1983. 12p. 21cm. SAT-Broŝurservo. Radioparolado, kiu defendis la aŭtonomian filozofion kontraŭ la ordona kredomoralo. Prezo: 1,80 gld.

Vojaĝo tra orienta Afriko, José Starck. Spa: la aŭtoro, 1983. 16p. 21cm. Rakonto pri la spertoj de blinda belga esperantisto. Prezo: 4,20 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5 %, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19 % por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

TEJO-paĝo

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

TEJO planas por 1984

Inter la 3a kaj la 5a de januaro (tuj post ege sukcesa Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Niendorf apud la Balta Maro), la estraro de TEJO, nove elektita en Debrecen, plenkunsidis en Hamburgo, laŭ la afabla invito de Hamburga Administra kaj Presa Servo (HAPS). Ĉi-dume alvenis ĉe HAPS ankaŭ tiom da ĉeestintoj de la ĵus okazinta Internacia Seminario, ke ekokazis kvazaŭ postseminaria ferieto.



Foto: Jovan Ošap

Gejunuloj en la 68a UK en Budapeŝto: Amuziĝon ne necesas plani; ĝi okazas spontane.

Nove iniciatitaj de la estraro estas la trejna kaj eldona programoj, kiuj stimulu aktivulojn per informfluo en la formo de manlibretoj, kursoj kaj seminarioj. Jam inter la 26a de aprilo kaj la 3a de majo okazos "seminario por grupgvidantoj" en Pollando, kiun kunorganizas Pola Studenta Esperanto-Komitato kaj TEJO. Interesitoj el okcidenta Eŭropo petu informojn ĉe Franz Kruse (Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen 1, FR Germanio), kaj orienteŭropanoj ĉe Jan Koszmaluk (ul. Żwirki i Wigury 97/99 p511, PL-02-089 Warszawa), kiu trankvilige informas, ke la seminario ne okazos en Szczebrzeszyn, sed en la multe pli prononcebla urbeto Kazimierz Dolny!


Ankaŭ polrilate, surbaze de la spertoj pri la amasoj da ne-esperantistaj partoprenantoj en IJK en Debrecen, la estraro konsentis, ke LKK por Swanwick rajtu limigi la nombron de polaj ĉeestantoj kaj peti de PSEK atestilon pri la Esperanto-kompetento de unuopaj aliĝantoj. Estas decidite plue esplori pri eventuala IJK en Hajfa (Israelo) en 1986.

Sur la kampo de eksteraj rilatoj TEJO ricevis de Eŭropa Junulara Fondaĵo subvenciojn por du seminarioj ĉi-jaraj. La unua el ili okazos samloke kaj samtempe kun la Internacia Junulara Festivalo en Rimini (Italio), de la 17a ĝis la 23a de aprilo. Ĝi pritraktos la temon "Modeloj de ne-perforta solvado de konfliktoj". Informiĝu pri ĝi ĉe Dario Besseghini (Cas. post. 210, I-56100 Pisa, Italio). Detaloj pri la alia seminario estas ankoraŭ anoncotaj. Bedaŭrinde la Fondaĵo rifuzis plian seminarion de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, kiu estus okazonta en la Eŭropa Junulara Centro mem en Strasburgo (Francio), pro la konkurenco fare de la pli granda kvanto da junularaj organizaĵoj ĉi-jare petantaj tiean seminarieblecon.

Jam venis al la Centra Oficejo amaso da informpetoj, preskaŭ ekskluzive de ne-esperantistoj, pri la Esperanto-labortendaroj, kies broŝureto aperos en aprilo.

Nova TEJO/KER-volontulo, Graham Cansdale (Britio), ekdeĵoris en la CO la 6an de januaro.

Loke



● **FR Germanio: En novembro la Esperanto-Societo de Frankfurto estis invitita al muzea ekspozicio pri Heinrich Hoffmann, aŭtoro de la fama infanlibro *Struvelpetro*, verkita en 1848. Wilhelm Barnickel, prezidanto de la Societo, koncize prelegis (vidu la foton) pri Esperanto, kaj s-ino E. Kruse (dekstre) deklamis (kun akompano de lumbildoj) el la Esperanta traduko de *Struvelpetro*. Prof. Siefert, direktoro de la Hoffmann-Muzeo, prezentis la diverslingvajn tradukojn (entute 22) de *Struvelpetro*.** **(Foto: Marion Herzog-Hoinkis)**

Fake

● **Informado:** Por la franclingva regiono de Belgio s-ro Germain Pirlot sukcese kunordigas gazetaran servon. Dum 1983 ĝi aperigis 167 leterojn aŭ artikolojn pri Esperanto. Tio estas 60 pli ol en 1982 kaj 132 pli ol en 1981. Pirlot komentas: "Tio pruvas, ke tre ofte pri la silento de la gazetaro kulpas la esperantistoj mem. Antaŭ kvin jaroj ni estis du por agadi, ĉar neniu deziris kunlabori; nun, pro la sukceso, ni estas dudeko". Kiel konate Pirlot havas konstantan rubrikon pri Esperanto en unu el la belgaj franclingvaj ĵurnaloj.

● **Periodaĵoj:** En 1984 aperos nova revuo: *Internacia komputado*. Ĝi liveros konkretajn novaĵojn, ne nur por komputistoj sed por ĉiu homo, kiu jam uzas aŭ volas uzi komputilon. La revuo aparte atentos novajn rezultojn el landoj malgrandaj, evoluantaj kaj lingve izolitaj. La provnumero jam aperis, kaj la abonon oni povas pagi per la loka valuto en 28 landoj tra la tuta mondo. La liston de abonperantoj senpage sendas: Komputista Grupo de Hungara Esperanto-Asocio, Poŝtfako 193, H-1368 Budapest, Hungario.

● **Parlamenta agado:** Nun montriĝas serioza ebleco okazigi debaton pri Esperanto – sub la titolo "La estonteco de internacia komunikado" – en la Unua Ĉambro de la Brita Parlamento. La organizanto de la Esperanto-agado inter la britaj parlamentanoj, Brian Barker, nun kontaktas ĉiujn 1 200 anojn de tiu ĉambro helpe de la komputilo de Brita Esperanto-Asocio. La grupo de britaj parlamentanoj, kiu subtenas la uzon de Esperanto, nun havas 128 membrojn. Du ĝiaj novaj anoj estas la iama ĉefministro Harold Wilson kaj George Thomas, antaŭa prezidanto de la Dua Ĉambro.

● **Radio:** Kvarfoje la 28an kaj 29an de decembro, la Monda Servo de BBC, Londono (*BBC World Service*), en jarfina humura programo "Du huraoj por 1983", disaŭdigis satiran skizon en miksita eŭropa pseŭdolingvaĵo kun Esperantaj elementoj, kun la nomo "Esperanto de EEK", satirigante politikan kaj lingvan neunuecon de Eŭropa Ekonomia Komunumo dum 1983. Temis pri amuza lingva mikspoto, kun rekoneblaj veraj Esperantaj vortoj kiel *ovoj* kaj *ankaŭ*. La Monda Servo havas minimume cent milionojn da ĉiutagaj aŭskultantoj en ĉiuj mondpartoj.

● **Interlingvistiko:** Jam por la 12a fojo, Akademia Centro Interlingvistika invitas al sia Scienca Interlingvistika Simpozio, okazonta en Varsovio de la 27a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1984. En la kadro de tiu renoma forumo por lingvofakuloj oni planas laborgrupojn pri evolutendencoj de Esperanto, Esperanta prononcado, lingvistikaj modeloj de Esperanto, interetna lingva komunikado kaj pri interlingvistika metodologio. Oni atendas kontribuojn en formo de prelego pri propraj lingvistikaj esploroj. Aliĝojn oni sendu al ACI, Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa, Pollando, dum la aliĝpagojn (inter 70 kaj 110 germanaj markoj) oni ĝiru al poŝtĉekkonto 2565-854 de Germana Esperanto-Asocio kiel peranto.

● **Interlingvistiko:** Pasintjare magistriĝis ĉe la Universitato de Witwatersrand, Sud-Afriko, Gaile Parkin per 189-paĝa disertacio: "La lingvistika strukturo kaj sociologiaj bazoj de kelkaj gravaj artefaritaj lingvoj". La anglalingva studo tamen traktas 115 lingvoprojektojn, inkluzive de la angla kiel monda lingvo. Esperanto ricevis ampleksan, favoran trakton.

Reklami Esperanton kaj la Kongreson!

Aperis bela dukolora (verdo kaj ruĝo) glumarko pri la 69a UK en Vankuvero. Ĝi estas ronda (diametro: 37 mm), memglua, kun amaso da lerte plektitaj detaloj: verda stelo, acerfolio (simbolo de Kanado), mondmapo, kongresaj nomo kaj dato. Prezo por 100 ekz. (minimuma mendokvanto): 11,40 (por Nederlando 13,56) guldenoj, inkluzive la afrankon. Triona rabato ekde 300 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



Post la originala *Hungara antologio* de 1933 nun fine aperis la nova, lukse bindita eldono de

Hungara antologio

Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj hungaraj aŭtoroj. Kompilita kaj kun ampleksa enkonduko de Vilmos Benczik.

Eld. Corvina Kiadó, 1983. 448 p. 24 cm. Bindita kun kvar-kolora kovrilo. ISBN 963 13 1625 4.
Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.
Prezo: 57,00 (por Nederl. 59,85) gld., plus sendokostoj.

"Tiu ĉi nova *Hungara antologio* pluetendas... la gamon prezentitan en la unua, kaj same entuziasme ni voras ĝin..."

William Auld

Persone

● **Gorov:** La prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, Ĥristo Gorov, estas distingita per unu el la plej altaj ŝtataj rekonoj de Bulgario – "Heroo de Socialisma Laboro". Gorov ricevis la distingon okaze de sia 75a datreveno, fine de julio 1983. Li lernis Esperanton jam en sia junaĝo, kaj liaj unuaj Esperanto-





verkaĵoj komencis aperi en 1928. Poste, pluraj liaj verkoj aperis libroforme, laste la poemaro *Ribela kordo*, kiun ĵus publikigis Hungara Esperanto-Asocio. Estas interese noti, ke alia bulgara esperantisto, s-ino Trajana Petkova, ricevis la saman distingon en 1983. Pli frue, en 1979, la distingon ricevis Nikola Aleksiev, kiu intertempe fariĝis ankaŭ Honora Membro de UEA.

● **Heide:** La nomo de la jugoslava Esperanta verkistino Zora Heide (1924), kiu jam pli ol du jardekojn vivas en Skandinavio (antaŭe en Danlando, nun en Svedio), estas bone konata en la Esperanto-movado. Ŝi plurfoje gajnis premiojn (prozajn kaj poeziajn) en la Belartaj Konkursoj kaj aperigis kelkajn librojn. Ŝia plej nova verko – *Etulaj aventuroj*, Stokholmo 1983 – konsistas el ok poeziecaj rakontoj pri infanaĝaj travivaĵoj. Estas aparte notinda la fakto, ke *Etulaj aventuroj* jam aperis en la sveda (en du eldonoj!) kaj ankaŭ en la kroatserba, la gepatra lingvo de la aŭtorino. Pri tia preskaŭ samtempa publikigo de du nacilingvaj tradukoj de libro originale verkita en Esperanto ne povas fieri multaj movadaj aŭtoroj.


● **Neergaard:** Anglalingva periodaĵo de Dana Registara Instituto pri Sempatologio por Evolulandoj, en sia numero de novembro 1983, dediĉas ampleksan spacon al raporto pri internacia simpozio honore al d-ro Paul Neergaard, kiu gvidis la Instituton de 1966 ĝis 1982, kiam li pensiiĝis. La eminentecon de la scienca renomo de d-ro Neergaard bele emfazas la fakto, ke la simpozion (ĝi okazis en oktobro 1982 en Kopenhago) partoprenis 190 sciencistoj el 40 landoj. La periodaĵo ne preteratentas mencii ankaŭ la esperantistecon de d-ro Neergaard, kiu estas membro de Honora Patrona Komitato de UEA kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Kvankam li en 1984 (la 19an de februaro) fariĝos 77-jara, d-ro Neergaard ankoraŭ restas tre aktiva: li partoprenis la Kongreson en Budapeŝto, kaj dum 1983 vojaĝis, pro sia faka laboro, i.a. al Saŭda Arabio kaj Mozambiko. Frue en 1984 aperos ĉ. 950-paĝa festvolumo dediĉita al la scienca laboro de d-ro Neergaard.

● **Buckley:** Por festi sian 70an datrevenon, Frank Buckley, brita advokato kaj konata Esperanta aktoro, turneas tra Britio kaj prezentas lumbildan kaj magnetofonan programon pri siaj kvindek jaroj kiel esperantisto. Buckley multfoje prezentis dramojn kaj muzikaĵojn precipe en britaj Esperanto-kongresoj. Li ankaŭ multe vojaĝis eksterlanden, ĉar li siatempe estis help-direktoro de Ruĝa Kruco en Britio. Grupoj, kiuj deziras viziton de Buckley, povas skribi al lia adreso: 620 Filton Avenue, Bristol, Britio BS 12 7LD.

● **van Keulen:** Oficialaj ŝtataj distingoj pro Esperanto-agado maloftas en Nederlando. Estas tial notinde, ke s-ro Johano van Keulen el Vlaardingen (apud Roterdamo) ricevis, okaze de sia pensiiĝo fine de novembro 1983, oran honormedalon, ligitan al la prestiĝa nederlanda ordeno "Oranje-Nassau". La urbestro de Vlaardingen, kiu nome de la Reĝino Beatrix transdonis la medalon, aparte emfazis, ke oni tiel rekonas ankaŭ la multjaran Esperanto-laboron de van Keulen. Li ekde 1961 redaktas la revuon *Dia regno* (kiu apartenas al la plej prestiĝaj fakaj Esperanto-periodaĵoj) de Kristana Esperantista Ligo Internacia (kunlaboranta kun UEA).

jam kompletigita plena verkaro de zamenhof?

Nu, preskaŭ! Aperis ĝis nun dek dikaj, luksaj volumoj. La tuto estas aĉetebla kiel kompleto por 390,00 gld. La unua volumo (*unuaj libroj por esperantistoj*) ne plu aĉeteblas ekster la kompleto. Aliaj 9 haveblas unuope (po 39,00 gld). Aperis ankaŭ du "kromkajeroj" (po 33,00 gld). Mendeblaj do estas: ■ *la inkunabloj de esperanto* ■ *ni laboru kaj esperu!* ■ *antaŭen al la laboro!* ■ *tamen la afero progresas!* ■ *hebreo el la geto* ■ *kun gradaj paŝoj eksterlanden!* ■ *klopodis organizi, sed vane!* ■ *por kaj kontraŭ reformoj!* ■ *mortinta, sed senmorta!* ■ Kromkajeroj: ■ *senlegenda biografio de l.l. zamenhof* ■ *korespondaĵo ludovikologia* ■ Ĉio ĉe: uea, jei, kleg.



eldonejo ludovikito

Anoncetoj

Tarifo: *ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

Usonaj skoltinoj, 13- ĝis 15-jaraj, serĉas samaĝajn korespondantinojn el la tuta mondo. Skoltinestro: D-ino Nancy Hattaway, 1185 Meadow Lane 114, Concord CA 94520, Usono.

La kurzo de la stelo en 1984: Dum la tuta jaro 1984 1 stelo egalvaloros al 0,90 nederlandaj guldenoj. Informojn ĉe: Universala Ligo, Vosseveldlaan 16, NL-3768 GM Soest, Nederlando.

Iranano, 20-jara, ŝatas korespondi. Parviz Gamshidi, P.O. Box 46, Shahin Shahr, Isfahan, Irano.

Se vi ne apartenas al la kategorio de "blindaj ŝafoj" (laŭ citaĵo de d-ro Zamenhof, en PIV pĝ 1055), legu la sukcesan aktualan broŝuron 64-paĝan de Ligue Française "Pro Unesco", 24 ave. Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Prezo (afrankite): 28 francaj frankoj aŭ ok poŝtaj kuponoj. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris.

Pri ekonomiaj kaj poeziaj temoj deziras korespondi tutmonde d-ro Erco Baraka, Strato Zamenhof 10, IL-94 184 Jerusalem, Israelo.

Gimnazianino, 17-jara, deziras korespondi kun samaĝuloj: F-ino Daniela Miller, Schäfflerstr. 1, Stockheim, D-8939 Bad Wörishofen, FR Germanio.

Brazila Spiritisma Federacio konigas al mendontoj novajn rabatojn: 33% plus sendokostoj por mendoj ĝis 10 (dek) ekzempleroj, eĉ malsamtitolaj; 40% plus sendokostoj por mendoj de pli ol 10 (dek) ekzempleroj, eĉ malsamtitolaj. Katalogo kaj prezaro haveblaj ĉe la eldonejo: Rua Souza Valente n-ro 17, BR-20941 Rio de Janeiro, Brazilo.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Aĉetu la diskon (aŭ kasedon) *Karnavaleto*, por vi aŭ por donaci, ĉe Olivier Tzaut, Arètes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk: 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkupono la deziratan objekton. Prezo (sendkostoj inkluzivitaj): disko 24 sv. fr.; kasedo 20 sv. fr. (*Tra l'mondo* elĉerpiĝis).

Irana instruisto, 22-jara, deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Abas Kiyani, P.O. Box 61, Mazanderan, Irano.

19-jara mongolo ŝatas korespondi pri natursciencaj kaj literaturaj temoj. T.S. Batzaya, Poŝtrestante, Central Post, Ulan-Bator, Mongolio.

Bulgaraj esperantistoj – 15- ĝis 68-jaraj – serĉas korespondantojn. Esperantoklubo, PK 61, BG-5180 Polski Trambeŝ, Bulgario.

Pri sporto kaj arto ŝatas korespondi 19-jara irana studento: Behnam Yoosefi, 298 str. No. 12, Ferdosi, Shahnin-Shar, Esfahan, Irano.

Argentina geedza paro planas vojaĝon al Eŭropo kaj serĉas taŭgajn kontaktojn: Ges-roj Tarducci, Sanmartin 1165, RA-2600 Venado Tuerto, Argentino.

NUDPIEDA GEN

La fama kontraŭmilita bildstria romano en mirinde flua esperanta traduko kaj bonega teknika prizorgo.

Nudpieda Gen (1973), Keizi Nakazawa (1929). Eljapanigis Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen, 1982. 4+284 p. Bildstria romano. 21cm. Prezo: 30,00 gld., plus sendokostoj. Mendebla ĉe: UEA, JEI, KLEG.

En la ĉi-jaraj belartaj konkursoj de UEA, la verko estas premiita kiel "Infanlibro de la Jaro 1982".





Malkovru la du duonojn de la nova

kontakto

Unu duono havas nekomplikan lingvaĵon, facilan kaj taŭgan por novaj esperantistoj. Du duonoj havas stimulan enhavon – interesajn artikolojn el la tuta mondo, kiujn verkas plejparte gejunuloj, pri aktualaj temoj: ekzemple en 1984: Religio, Kooperativoj, Homo kaj maŝino, Krimo kaj Esplorado.

Membroj de UEA/TEJO malpli ol 26-jaraj kaj Patronoj de TEJO ricevas la revuon *Kontakto* sen plia pago. Aliaj povas aboni ĝin. Membriĝu aŭ abonu nun ĉe la kotizperantoj de UEA! Petu senpagan specimenon de ili aŭ de la Centra Oficejo.

Kontakto estas abunde ilustrita, en dukolora preso. Ĝi aperas ses-foje jare: jen dek du duonoj kiujn vi nepre malkovru!

Eldonejo - librejo SONORILO


- **L'espéranto dans l'enseignement:** d-ro Pol Denoël. 1982 (2a eld). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. 100 BF.
- **Initiation théorique et pratique:** d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. 180 BF.
- **Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj,** kun surpresitaj stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakaĵoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj: 145 BF.
- **Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto,** kun homa figuro kaj verda stelo. 7 × 17 cm. 25 BF.
- **Novjaraj gratulkartoj:** kvar diversaj koloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj. Dua eldono. 60 BF.
- **Leksikono de Bovy:** J.P. Bovy. Herstal: APE, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. Vortareto en kvin lingvoj (Esperanto, angla, franca, nederlanda, germana). 240 BF.
- **Eldonejo-Librejo SONORILO** estas peranto de: *Budapeŝta informilo, El popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, Monato, Norvega esperantisto, Oomoto*. Petu abonprezojn en via nacia valuto.
- **De la 5a de okt. 1983 ĝis la 1-a de marto 1984** nia Librejo aŭtomate donas rabaton de 5%, se via mendo superas la valoron de 500 BF (ekskluzive la sendokostojn). Ni vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromerkato. Al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: 20% por la mendo sub la valoro de 1800 BF, kaj 10% por la mendoj de pli granda valoro. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima landa liveranto aŭ rekte ĉe:

Eldonejo-Librejo SONORILO , Doornstraat 22,
B-2610 Wilrijk (Antwerpen)
Belgio. ☎ (03) 827 24 05.
Ni estas konataj pro malaltaj prezoj kaj rapida servo!

Jen postmorte la vivoverko de la iama vicprezidanto de la Akademio, elstara esperantologo.
Inter la temoj, kiujn traktas ĉi tiu kolekto de esperantologiaj eseoj troviĝas ankaŭ la jenaj:

- Fonetiko; Vortfarado; Prepozicioj
- Sinonimoj kaj homonimoj en Esperanto
- La arto traduki; Propraj nomoj
- La elementoj de Esperanto, ĉu arbitre elpensitaj?
- Onomatopeoj en Esperanto.

La lingva esenco de Esperanto, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 176 p., 21 cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld. plus sendkostoj. Sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



REALIGU VIAJN REVOJN

Specialaj antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj en Usono kun esperantistaj ĉiĉeronoj, nur por esperantistoj!

Limdato por mendoj prokrastita ĝis la fino de februaro.

Vivu viajn fantaziojn kaj venu al Usono por vidi, interalie, ĉi tiun fe-kastelon kaj...

ANTAŬKONGRESA EKSKURSO
(7-21 julio)

– Nov-Jorko
– Bostono
– Vaŝingtono
– Orlando
– Ĉikago

kaj [illegible] tiaj vidindaĵoj!

Prezo inkluzivas 14 nok[illegible] sonaj ĉambroj, klima[illegible] ktp. [illegible]onadon por[illegible] hejmen. Speciala flu[illegible] non" (ane[illegible] goj [illegible] Eks[illegible] Bile[illegible]

[illegible]oraj prezoj:
$US 1 245
[illegible]izitu Usonon" $US 399

DEPONSUMO por antaŭ- aŭ postkongresa ekskurso: po $US 200
Pagu al UEA kun indiko sur via pagilo "Antaŭkongresa/Postkongresa ekskurso"



POSTKONGRESA EKSKURSO
(29 julio - 11 aŭg.)

– San-Francisko
– Hollywood
– Los-Anĝeleso
– Granda Kanjono
– Las Vegas
– Parko Yosemite
– regiono de San-Diego
kaj multaj aliaj lokoj

Prezo inkluzivas flugon de Vankuvero al San Francisco, loĝadon dum 13 noktoj en hoteloj (privataj banĉambroj, klimatizo, televidilo), transporton, ĉiĉeronadon ktp. Ekskurso nun unu tagon pli ol anoncite en septembro, sed provizora prezo nun fariĝis $US 1 175

Dum ambaŭ ekskursoj vi havos eblecon viziti lokajn esperantistojn hejme. Kelkaj esperantistoj jam mendis ambaŭ ekskursojn por certigi, ke ilia vizito al la 69a UK estos vere neforgesebla! Por tiu mendo bv deponi $US 400

Post ricevo de via deponsumo ni sendos kvitancon kuj luksan broŝuron kun plenaj detaloj pri la ekskursoj. Petu tiun broŝuron de UEA se vi ankoraŭ ne decidis mendi. UEA helpos vin aranĝi vian flugon al Ameriko kaj havigos la specialajn biletojn "Vizitu Usonon" al la antaŭkongresaj ekskursontoj.

Organizado: Esperanto-Vojaĝservo de ELNA en kunlaboro kun UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bankkonto n-ro 25.52.89.804 Bank Mees & Hope, Rotterdam. Poŝta ĝirkonto de la banko estas pĉk (nederlanda) 6400 – indiku nian bankkontonumeron sur la pagilo kiel la celon de la pago, se vi pagas tiel.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 64 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

Jarabono: 13,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (33,00 guldenoj; por Nederlando 34,65 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska